

100

Jubilea

100-a numero
de Starto



1984-1.
starto

Výtvarná řemesla Praha
 Vám nabízejí široký
 sortiment bytových
 doplňků a dárkových
 a upomínkových pře-
 dmětů,
 vyráběných převážně
 v malých
 seriích s častou inovací.



Nabízíme:

soustružené mocca soupravy
 soustružené odkládací stolky
 malované porcelánové soupravy i jednotli-
 vé kusy
 malované a broušené vázy, mísy a popel-
 níky
 výrobky z cínu
 bižuterii kovovou a koženou
 a další sortiment z kovu, kůže, koženky,
 textilu.

Adresy prodejen upomínkových a dárkových předmětů:

110 00 Praha 1, Národní tř. 37	22 41 94
110 00 Praha 1, Vodičkova 28	24 47 71
110 00 Praha 1, Spálená 39	29 27 04
110 00 Praha 1, Na poříčí 35	23 17 315
110 00 Praha 1, Křížovnické nám. 2	26 63 28
120 00 Praha 2, Anglická 18	25 98 56
110 00 Praha 1, Lazarská 5	29 83 22
110 00 Praha 1, Železná 12	22 79 14
170 00 Praha 7, Obránců míru 17	37 44 84
110 00 Praha 1, Můstek – stanice metra	26 14 19
360 00 Karlovy Vary, Mariánská 2	930/28 381


Vzorkovna nábytku:

110 00 Praha 1, Václavské nám. 41	26 40 64
-----------------------------------	----------

přijímá objednávky na individuální zakázky
 nábytku a byt. doplňků.

V našich prodejnách
 naleznete vhodné dárky
 pro každou příležitost.
 Naše pracovnice Vás
 ochotně obslouží
 a pomohou vybrat
 předmět,
 který potěší.

STARTO JUBILUJE



M I L É S T A R T O ,

ani se nám nechce věřit, že jsi dosáhlo svého významného jubilea - 100 čísel. Jak to všechno utíká! Kde jsou ty doby, kdy jsi bylo poprvé rozmnoženo cyklostylem a oznámilo start nové etapy esperantského hnutí v Československu. Kolikrát jsi se proměnilo a rozčeřilo stojaté vody, bránilo co si obranu zasloužilo a útočilo na to, co bylo třeba bořit.

Mělo jsi své malé i velké bolesti, muselo jsi mnohé vyslechnout a také zatnout zuby, aby ses buď nerozplakalo anebo nezahořklo nad nepochopením i hrubými urážkami. Přesto jsi tu vždycky bylo s námi, dávalo jsi směr, radost i poučení tam, kam se jiné informace o našem hnutí nedostaly.

Budiž ti za to dík. Dík za pomoc, kterou jsi dostávalo nejenom od svých tvůrců, ale i ode všech, kteří tě s pozorností četli a reagovali.

Přejeme ti, abys do té druhé stovky vykročilo stejně kurážně a stejně dobře, jako jsi to umělo až dosud.

Tvoji čtenáři a redakce se spolupracovníky.

RESUMO: Gratulo al 100-a numero de STARTO.



PRI NOVA EKSPEDMANIERO DE STARTO

Ĉar STARTO meritas ricevi, kiam jubileas siajn 100 numerojn, enkaŭ novan jakon, nia redakcio nun ĝin donas al Starto kaj enkaŭ al vi, estimata leganto. La koverto estos presota es-tonte tiel, ke ebligos ĝin ekspedi sen pakado kaj sen labor-plena skribado de adresoj. Ni esperas, ke vi akceptos tiu-ĉi nian decidon kun plena via kompreno. Samtempe ni volas estonte presi dukolora uzante enkaŭ alian koloron ol nigra - kiel ni provis nun.

Rigardu vi ĉiuj, kiuj volas skribi ion en la Starto, je la terminoj ĝis kiam ni akceptas por kuranta numero de Starto la artikolojn. Limdatoj estis presitaj en Starto 4/83.

Redakcio

LA GAZETARO PRI NI

Praktike ne eblas kroniki en **STARTO** pri ĉiuj gazet- kaj ĵurnal-informoj, kiuj rilatas al nia laboro kaj al Esperanto generale.

Mi menciis do kelkajn gravajn artikolojn, kiuj min atingis ĝis septembro 1983.

JISKRA, organo de VŽKG Ostrava-Vítkovice, enpresis /n-ro 22, junio/ interesan intervjuon kun Drahomír KOČVARA "Por paca lingvo". Pri "sia" Esperanto Drahomír KOČVARA scias rakonti vere eminentege - asertas la redaktorino ŠTĚPÁNKOVÁ.

SVOBODNÉ SLOVO /18.6./: redakteia intervjuo kun Zdenko KRÍMSKÝ "Por interkompreniĝo de homoj", inspirita de la decido de la Monda Asembleo por Paco kaj Vivo en Prago komisiis al Ĉeĥa Esperanto-Asocio garantiadon pri la asemblea faka kunsido "Komunikado".

Kelkaj numeroj /ekz. 23, 24, junio/ de HLAS REVOLUCE /ĈSPFB/ alportis sciancan laboraĵon de studentino Hana ŽÁKOVÁ /Ostrava-regiono/ "La eksterlandaj Lidice", por kio ŝi estis akirinta materialojn el kelkaj kontinentoj pere de la Esperanto-movado. Tiu laboraĵo estas ago vere pionireca.

R. KORČAK, neesperantisto, renoma aktivisto en la Asocio de invalidoj, skribis bonegan artikolon /laŭ juĝo de Vuk ECHTNER/ "Agado de kluboj de blindaj esperantistoj en USSR", en ZORA /n-ro 7 - 8/.

La radio-revuo ROZHLAS enpresis /en julio kaj aŭgusto/ iom longajn leterojn rilatajn al Esperanto en Radio /de J. MAŘÍK kaj de J. PATERA, la lasta en n-ro 34/.

La faka revuo VĚDA A ŽIVOT /Scienco kaj vivo/ en sia 8-a n-ro enhavas faktorian eseon de ing. ČERDLE pri apliko de Esperanto en la scienco kaj teĥniko, kaj en la 9-a n-ro kontribuon de ing. Margit TURKOVÁ pri Esperanto en la pacmovado.

La plej okul-plaĉan /kun koloraj fotoj el la ĈEA-sekretariejo/ inform-artikolon pri la stato de la Esperanto-movado en ĈSSR, kun monda publikeco, aperigis la porensterlanda revuo "ĈEROSLOVAKA VIVO", n-ro 4, en ĉiuj lingvaj versioj: angla, franca, germana, itala, hispana, ĉie sur la 1-a pago. Kaj tiu ĉi eminenta diskonigo de nia laboro estis inspirita per petletero de leganto en F.R.Germanio /kiel facila maniero - kaj tia bonega rezulto!/.

Krom tiu ĉi bonvena informado aperis ankaŭ negativa asertado /asertoj vere malicaj/ en la revuo CIZÍ JAZYKY VE ŠKOLE - n-roj 9 - 10. Instruisto J. TOMIE /Krupiná/ regardas tie siajn - jam longe konatajn - asertojn favore al INTERLINGVA /IALA/ kaj malfavore al Esperanto. La redaktoro de la revuo ricevis protestajn kaj regustigajn leterojn de legantoj. La revuon eldonas la Ministerio de kulturo en SPN.

J. Mařík

ESPERANTO KIEL EDUKILO

Por la disvastigado de la internacia lingvo havas la instruado fundamentan signifon, ĉar sen ĝi ne povas fariĝi novaj esperantistoj, ne povus kreski la membro-nombroj en niaj asocioj, ne povus edukigi novaj verkantoj, tradukantoj, funkciuloj kaj uzantoj de la lingvo ĝenerale. Sen bona kaj altkvalita instruado ne povas nia movado akiri la bezonatan estimon kaj respekton en la neesperantistaj medioj, precipe ĉe klerigaj institucioj kaj ĉe ministerioj de instruado.

Estas necese konscii, ke de la fremdlingva instruado oni atendas ne nur disvastigadon de lingvoj, sed ankaŭ pli ĝeneralajn edukajn celojn. La fremdlingva instruado devas eduki nian junularon al internacia amikeco, al ekkono de geografiaj, sociaj kaj politikaj kondiĉoj de aliaj popoloj, al firmigo de la klasa konvinko el la laborista starpunkto, kaj ankaŭ al pli bona scio de la gepatra lingvo. Jam pro ĉi tiu lasta motivo la klerigaj institucioj rigardas tre malfavore nian ĉe - metodon kaj aliajn rektajn metodojn, kiuj eliminis la gepatran lingvon el la fremdlingva instruado. Krome: la scienco pruvis, ke nur por malgrandaj infanoj /maksimume 9-jaraĵ/ estas natura la instruado bazita sur la unua signalsistemo, dum la pli aĝaj infanoj, adoleskantoj kaj plenkreskuloj ĉiam akceptas novajn vortojn /ĉe la patralingvaj/ surbaze de komparo kun la jam konataj esprimoj de la gepatra lingvo. Do ankaŭ lernanto instruita ĉe-metode tradukas en sia menso ĉiun novan komprenitan vorton patralingven.

Jam kelkajn jarojn post la forigo de la deviga instruado de la latina lingvo el la lernejoj montrigis gravaj damaĝoj, kiujn ĉi tiu paŝo kaŭzis. Per la latino la junularo konatigis ne nur kun la klasika kulturo, sed ĝi akiris ankaŭ bazan lerton kaj kutimigojn bezonajn por pli profunda scio de la gepatra lingvo kaj por lernado de ceteraj lingvoj fremdaj. La latinaj frazoj instruis rapide kaj lerte analizi fraz- kaj vort-elementojn, kio estas necesa por fremdlingva lernado kaj ankaŭ por kultura patralingva esprimado. Multaj studentoj /kaj ofte ankaŭ instruistoj/ ne komprenas, kial oni instruas en la lernejoj pri la subjekto, predikato, objekto kaj adjekto, des malpli kial oni turmentas sian kapon per prefiksoj, sufiksoj kaj vortradikoj. Sekve ili ankaŭ ne komprenas, kial ili ne kapablas orientigi en fremdlingva propozicio aŭ kompreni fremdlingvan vortderivadon. La manko de la suficia ekzercado de la fraz- kaj vort-analizadoj estas en niaj lernejoj tre peze sentata.

Alia grava tasko de la latina instruado estis konigi al la junularo la internaciajn vortojn, kiuj formas bazon por fakterminaroj kaj havas do grandan signifon por ĉiu homo, ĉar ĉiu el ni laboras en iu profesia fako. Multaj internaciismoj uzigas ankaŭ en la ĉiutaga vivo, en la gazetaro, televido, radio. Nuntempe neniu lingva puristo povas eskapi el la lavango de la internaciaj esprimoj, kaj kvankam la popolo ne lernas ilin celkonscie, puŝigas kontraŭ ilin vole-nevole preskaŭ ĉiutage. Tio

elvokas hontemon unuflanke kaj fanfaronemon /aŭ suspekton pri fanfaronemo/ aliflanke.

Sur paĝoj de ĉeĥoslovakaj instruistaj fakgazetoj oni lastatempe multe diskutis, kiamaniere tiun mankon kompensi. Oni parolas pri eldonoj de specialaj lerniloj, pri rondoj de nedeviga instruado de internaciismoj, de la latino aŭ de la internacia lingvo INTERLINGUA. Ĉiukaze oni postulas, ke oni instruu la internaciismojn ne nur kiel rezultajn vortojn, sed ankaŭ iliajn etimologiojn, vortradikojn kaj afiksojn /ekz. ab-, ad-, re-, de-, in-, bi-, ko-, hiper-, sub, -logo, -grafo, -skopo, k.a./.

Esperanto kiel internacia lingvo havas ŝancon anstataŭi la latinon en ĝia eduka funkcio kaj pruvi siajn proprajn klerigajn kvalitojn kaj avantaĝojn. Sed ĝi ne nur povas tion fari, sed nepre devas, se ĝi volas esti konsiderata kiel serioza pedagogia rimedo de la moderna epoko.

Per sia aglutina derivado Esperanto instruas la vortanalizon pli bone kaj pli perfekte ol iu ajn alia lingvo. Ĉi tiu derivado estas nia granda kapitalo kaj por pli facila instruado de Esperanto kiel internacia interkomprenilo kaj ankaŭ por ĝia ĝenerala eduka valoro. Ni ne neglektu tiun kapitalon per Esperanto-nacilingvaj vortaroj prezentantaj derivaĵojn kiel memstarajn vortojn /aliri, eniri, foriri/ ne devigante la uzanton analizi la vortojn, sed ni uzu en niaj vortaroj ĉiam la sistemon de la kapvorto /iri, al-, en-, for-/. Dum niaj instruohoroj ni ne neglektu la fraz-analizadon /subjekto, predikato, objekto, adjekto/ opiniante, ke ĝi apartenas nur al la instruado de la gepatra lingvo. Nur tiam, kiam junaj esperantistoj montras ĉe lernado de ankaŭ aliaj lingvoj pli bonajn rezultojn ol la ceteraj neesperantistaj lernantoj, oni agnoskos la utilecon de la internacia lingvo por la edukado.

Estas afero konata, ke en nia lingvo kunpuŝiĝas du rivalaj tendencoj, la skemisma kaj la naturalisma. Tial ekzistas vortaj duopoj kiel toreisto - toreadoro, personaro-personalo, problemaro-problematiko, organizo-organizacio, malrapida - lanta, kaleŝaĵo - karoserio, ktp. La skemistoj akre atakas la naturalistojn riprocante, ke ili komplikigas kaj malfaciligas la lingvon, la naturalistoj same akre rebatas, ke la skemistoj primitivigas la lingvon. La naturalistoj enkondukas en la lingvon neologismojn kaj ankaŭ novajn afiksojn, pro kiuj oni akuzas ilin, ke ili volas gloriĝi kiel gvidantoj de novaj skoloj ktp. Felice, en Esperanto ĉiam havas la lastan vorton la praktiko kaj tiu ĝis nun konservis ambaŭ tendencojn. Tio estas logika, ĉar la naturalismoj jam dekomence servis al Esperanto kiel kruda materialo por pli posta skemigo, kaj krome, la ambautendencaj esprimoj riĉigas la frazon: Ĉi tiu toreadoro kiel sperta toreisto certe scias, ke ...

La situacio rilate al la internaciaj prefiksoj kaj sufiksoj ankaŭ ne estas facila. Por simpla esperantisto sufiĉas la kvindeko da Zamenhofaj afiksoj, sed ili absolute ne sufiĉas por la fakliteraturo, kaj ne devas per ili kontentigi la vortaristojn kaj Esperanto-lingvistojn. Simplaj esperantistoj ne bezonas scii, ke en la lingvo ekzistas pseudosufikso-enco, kaj vortojn kiel pacienco, konkurenco, konsekvenco - li povas simple konsideri radikojn kaj konforme al tio manipuli ilin.

Sed la vortaristoj devas scii pri la pseŭdosufikso, kaj se en la lingvon penetras rivale formoj ekz. licenco, licenso, licenzo, ili devas aprobi la unuan. Mi jam menciis, ke por la mezlerneja kaj altlerneja edukadoj oni postulas, ke la studentoj konu ne nur la signifon de la tuta internacia vorto, sed ankaŭ la signifon de ĝiaj afiksoj. Se en la lingvon jam penetris vortoj kiel ekz. prefaco, prefikso, prepozicio, Esperanto ne komplikigos per la klarigo, ke PRE- en ĉi tiuj vortoj signifas ANTAŬ-. Alia demando estas, ĉu fari el tia prefikso prefikson ĝeneralan kaj envicigi ĝin inter la ceteran E - afiksaĵon. Ekzistas tiaj provoj, sed sole la praktiko montros, ĉu tio estas bezona aŭ ne.

Fine mi volas konkludi:

- a/ ne sufiĉas instrui Esperanton nur por ĝia disvastigado, necesas eluzi ĝiajn ĝeneralajn pedagogiajn kvalitojn;
- b/ ni ne subtakso, sed emfazas la instruadon de fraz- kaj vort-analizoj per Esperanto;
- c/ ni instruu per Esperanto la internaciismojn kaj ne timu instrui ankaŭ ilian etimologion kaj /pseudo/afiksojn.

M. Malovec

EL SUB FICHELBERG

...la plej alta monto en GDR /ERCMONTARO/ denove vin invitas esperantistoj per sia

VII-a INTERNACIA TURISMA RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ EN ERCMONTARO /TREE'84/

Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, subdistrikta estraro Schwarzenberg kaj Ĉeĥa Esperanto-Asocio, loka grupo en Karlovy Vary la 10-an de oktobro 1983 plilongigis sian amikan kontrakton je pluaj tri jaroj - ĝis jarfino de 1986. Plenumante la plej gravan punkton de la kontrakto - ebligi renkontiĝojn por ĉiuj esperantistoj - la ambaŭ organizaĵoj invitas vin

10 - an - 14 - an de majo 1984

en faman sportcentron de GDR - JOHANNGEORGENSTADT - por ĝui turisman migradon en pitoreska montarpejzaĝo /kvar interesaj piedekskursoj/, aŭskulti interesajn prelegojn pri la naturo kun diapozitivaj, samtempe viziti preparolatajn naturaĵojn - kaj en nelasta vico manifesti nian subtenon de la plej grava afero de nuntempo - de la mondopaco.

Loĝado en komforta turisma hejmo "Helmut Gansauge" en Johanngeorgenstadt /5-litaj ĉambroj permesas akcepti entute 70 personojn/. La prezo 160,- GDR-marĉoj garantias al vi plenan pension /4 tranĉoj, ĉiutage trifoja manĝado, kotizo/. Eksterlandanoj/ekskluzive GDR-anoj/povas pagi surloke sub kondiĉo, ke ilia aliĝo estas konsiderata deviga. GDR-anoj bonvolu pagi per la poŝtpagilo al Sparkaso Schwarzenberg, kontonumero 5882-37-4246.


La aliĝilojn kaj informojn petu ĉe :

Rudolf Eichler,
Hermann-Matern-Str. 21,
DDR-9430 Schwarzenberg,
G D R

Jaroslav Klement,
Kpt. Nálepky 7,
CS-360 04 Karlovy Vary,
Č S S R

Limdato por resendo de la aliĝiloj: 1-an de aprilo 1984
Ĝis la revido en nia Ercmontaro!

Scienc-teĥnika sekcio de ĈEA



A E S T ' 8 4 - SEMINARIO PRI APLIKO DE ESPERANTO EN LA SCIENCO KAJ TEĤNIKO

Scienc-teĥnika sekcio de ĈEA Esperanto-Asocio aranĝos sian trian internacian seminario AEST' 84 de la 31-a de aŭgusto ĝis la 2-a de septembro 1984 en BRNO. La ĉefa temo de la seminario estos PERSPEKTIVOJ DE LA MONDA NUTRAJ-PRODUKTADO.

La dua sekcio de la seminario AEST' 84 estos dediĉita al problemoj de la faka Esperanta terminologio kaj tradukado.

Ĝis fino de novembro 1983 aliĝis jam 54 interesatoj kun sume 14 prelegoj.

La prelegoj kaj fakkunveno okazos en Sindikata Domo Kultur-kaj Sciencfaka en la moderna parto de la urbocentro. La loĝado estas certigita en altlerneja studenta hejmo, proksime de la seminariejo.

Se vi intencas partopreni - ĉu kun aŭ sen prelego - bonvolu senprokraste kontakti ing. Zdeněk PLUHÁŘ, CS - 507 51 HOLOVOUSY V PODKRKONOŠÍ 109, Ĉeĥoslovakio, kiu detale informos vin.

Detalajn informojn pri la seminario AEST' 84 legu ankaŭ en STARTO 4/1983.



ni recenzas

István NEMERE: LA BLINDA BIRDO. Romano. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio, 1983. Paĝoj 118, formato 20 x 14 cm, kartonita.

En tiu ĉi libro la rakonta arto de la aŭtoro tenas la leganton en absorba streĉo ĝis la lasta paĝo. La verkinto konjektigas al ni, ke li tre proksime kaj kvazaŭ laŭsperte konas la cirkonstancojn kaj okazadojn en la preparolata rasisma "Suda Respubliko", kie la senrajta negra plimulto de loĝantaro suferas sub la senindulga blankula teroro. Oni senpene divenas kiuj estas la ĝustaj urbonomoj kaŝitaj sub Pretville, Yoburg, kiu estas la Nordeuropa lando Skanio. Ni partoprenas la sensan-

cajn kaj kuraĝajn provojn de Skandia verkisto Sven Viborg savi sian nigrulan amikon kaj kolegon-verkiston Govan Dyebo el la mallibereja murdejo de la kruela apartisma reĝimo. La verko ionicas nin en la fiaparaton kaj metodojn de tiu rasisma lando kaj aludas eventojn konatajn el la raporto de la tutmonda preso. Ĝis la katenanta priskribo de la fuĝigo de la jam mortmal-sana Govan Dyebo helpe de la negra "Fronto" vi ne forŝirigos de la paĝoj. Pripensoj filozofiemaj ornamas la enhave altnivelan, stile bonan libron. La lingvo estas adekvate bonnivela.

Krom tre malmultaj preseraroj englitis kelkaj lingvaj korektindaĵoj. La instruon kaj literature valoran verkon kun ri-portgenraj facetoj mi povas rekomendi al ĉiu pretendema leganto.

Jiří Kořínek

ARTHUR NOBES: HISTORIO DE LA BRITA LABORISTA ESPERANTO-ASOCIO KAJ INTERNACIO DE PROLETA ESPERANTISTARO. Havebla ĉe s-ino Penelope MAYBIN, 48 Maidstone Road, ROCHESTER, Kent ME 1 1RJ, Anglio. Paĝoj 24, formato 15 x 21 cm, ilustrita.

Tiu ĉi bele ekipita broŝuro estas rememoroj de brita k-do Arthur NOBES pri la laborista E-movado inter la du mondmilitoj. Multon li mem spertis - li esperantistiĝis en 1931 estante 26-jara, multon li aŭdis de pli malnovaj esperantistoj kaj ankaŭ trovis en konservitaj materialoj. Lia verko spiras per amo al laboristoj kaj al la unua socialisma lando en la mondo - Sovet-Unio. En la laborista movado aktivis ne nur viroj, sed ankaŭ virinoj, inter kiuj plej eminentis Gladys KEABLE, kiu ankaŭ ilustris laboristajn publikaĵojn. Oni legas pri malfacilaj kondiĉoj, en kiuj la laboristoj fondis Britan Laboristan Esperanto-Asocion kaj Internacion de Proleta Esperantistaro, pri persekutado en faŝista Germanio, pri hispanaj interbrigadanoj, kaj ankaŭ pri bedaŭrinda skismo inter la membroj de BLEA pro la starpunkto al SAT, en kiu kristaliĝis akraj kontraŭsovietiaj tendencoj.

Bedaŭrinde, la broŝuro enhavas presajn kaj gramatikajn erarojn. Per sia enhavo ĝi bone kompletigas la broŝuron "Sur la du frontoj", eldonitan de ĈEA en 1981.

Adolf Stanura

KATOJ KAJ ĈEVALOJ, poemaro de Adalberto HULŠ. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio 1982, 80 paĝoj, formato 14x20 cm, kartonita, prezo 50,- Ft.

La aŭtoro, 56-jara diplomita instruisto de hungara lingvo kaj latino prezentas al ni sian lirike-filozofian versregalon sub kromtitolo NOTAĴOJ DE IU PASAĜERO. Kiel similaj verkoj ankaŭ tiu ĉi prezentas poemojn tre bonajn apud pli feblaj, iom anemiaj. Kelkaj estas rimitaj, plejparto modernstile senrimaj liberformaj. Placiis al mi ekz. KIEL LA EKSKURSO, MALSERENA VETERO, HOMO SUR LA RONDSTRATO, ETAJ EKSTREMOJ, PREGO AL LA VENTO, AL LA ĈEESTANTO kaj kelkaj pliaj, kiuj fresbilde kaj lirike esprimas filozofumadon de l' poeto. Sed enestas ankaŭ poemoj rebusaj, kiujn ĝuos enigmosolvantoj. Tiaj floras abunde en naciaj poezioj: oni devas la poemojn plurfoje tralegi por konjekti, ke oni sukcesis laŭspuri /au diveni au ne diveni/ kion

la poeto al ni diras aŭ opinias diri. Ĉar en Esperantujo da lingve perfektaj lingvouzantoj, kiuj facile orientigas en tia moderna idelabirinto pliigata de foresto de interpunkcio, estas relative malmulte, ĉi tiaj poemoj ne havas tian sukceson kaj aprezon kiel la pli klarsencaj. Per tio mi ne volas diri, ke eĉ en Esperanto oni ne verku kaj ne eksperimentu tiukampe.

Por poemoj de speco ANTAŬTAGMEZA TEO, kie verso ĈEVAL' dikfingron GRANDA ĈEVAL', DIKFINGRON GRANDA kvinfoje sinsekve ripetigas kaj konsistigas duonon de la nebuleca poemo, mi ne do-rlotas simpaton. Tio estas por mi grafikaj jonglaĵoj, nenion pli. La poemoj /116 sur la 80 paĝoj, de iuj 3-4 versaj/ atestas pri la profunda lingvoscio de la aŭtoro kaj ne malpli profunda; liaj meditadoj. Certe multaj trovos plezuron kaj plaĉon en tiu libreto.

J. Koříněk

KELKAJ RIMARKOJ PRI NIA ARTA KUIREJO. Sub titolo EN LA KORO DE EŬROPO kompilis kaj aranĝis Josef RUMLER montraĵon el poeziaj kaj prozaj verkoj de kelkaj ĉeĥaj poetoj kaj verkistoj precipe el la lasta tempo. Kvankam la 32-paĝa kajero /inkluzive unu paĝon kun portretoj de kvar elstaraj esperantistoj/ ne estas, nek povas esti sufiĉe reprezenta, tamen ĝi donas certan enrigardon en la kreadon de ĉeĥaj Esperantaj literaturistoj el la nova tempo, inter ili de Josef RUMLER kaj Jiří KAREN. Granda avantaĝo de la broŝuro, eldonita de Ĉeĥa Esperanto - Asocio, estas ĝia lingva alta nivelo stila kaj zorgema forigo de ĉiuj /krom du/ preseraroj.

Ĝi enhavas eseecajn artikolojn, en kiuj la redaktinto Josef RUMLER pledas por sia koncepto de moderna, riĉa lingvaĵo, kiu kapablu esprimi diversajn stilojn, ekz. lirikan, ĵurnalistan, riportistan, fakan, ktp. Li ne hezitas enkonduki 26 novajn vortojn, kiujn ne listas PIV, kaj donas lastpage klarigon pri ilia signifo. El ili kelkaj, kvankam ne estantaj en PIV, estis jam dum jardekoj uzataj kaj listitaj en diversaj vortaroj/ekz. paŝala, verifi/, aliajn li rekomendas por esprimi ian nuancon kaj do ne esti nuraj sinonimoj. Tiucele li apogas sin je la regulo 15-a. La esperantista lingvouzantaro decidis, kie oni lin sekvas. Certe taugas ekz. Konstruktii, konstrukcio, eble prekera, songo /nuancnocio kiel ekz. sansono/ apud kanto, kanzono, lido, hito. Solti devus /soltas/ esprimi la duĉan devon, kiu apenaŭ estas aŭ estis obeata /germ. SOLLEN, eĉe mit v povin-nosti/, kion oni ĝis nun esprimas per kondicionalo de la verbo devi. Pro la dusenceco de devi - ja eĉ trisenceco en la negativa formo: mi ne devas - nemusim, nemám, nesmim/ mi devus ne ... mi ne darfus/, Karolo PÍČ por kategoria devo proponas musti. Pri tiu ĉi verbo oni jam foruzis sufiĉe da inko dum lastaj 70 jaroj; oni legu en Literatura Mondo diskutojn inter K. KALOCSAY kaj d-ro PAWLIK. Naskiĝis proponoj nuanigi per devi, deveti, devęgi, provizore servas la kondicionalo, kiam ne sekvas la kondica subpropozicio.

Ĉe la enkonduko de novaj nuanvortoj mi rekomendus procedi singarde kaj uzadi tiajn vortojn unuece, t.e. precizigi ilian semantikan signifon, ĉar t.n. internacieco estas ofte trompa, kaj tiaj vortoj havas en diversaj lingvoj iom aŭ tute

malsamajn signifojn. Kaj ni memoru, ke niaj fakaj kaj sciencaj terminaroj postulos dekmilojn da novaj vortoj kaj ni do ŝparu pri nia **RICIGADO**. Multuzataj noĉioj en la komuniza lingvo povas dezirinde havi sinonimojn aŭ preskaŭsinonimojn kiel malmo-la - dura, mallonga - kurta, malrapide - lante, malproksima - fora, dista, lontana k.s.

Sed pluraj sinonimoj ĝe fakvortoj, kiuj devenas el maldisciplineco, kapricemo aŭ nedisponado je taŭga vortaro de iuj aŭtoroj, estas ĝena balasto de niaj vortaroj /rangifero, boaco, norda cervo; kavio, kobajo k.s./. Se en kelkpaĝa kajereto aperas aro da novaj vortoj, tio kelkiun ekscitas pro timo, ke ni baldaŭ ŝveligos nian Plenan Vortaron konkure kun la angla 400 000 - vorta. Dume ni tamen bezonos baldaŭ vortojn kiel atrakta, dispeĉi, dispeĉisto, dispeĉejo, blami k.s. Sed ni enkonduku tiajn pripense kaj poiom, ne lavange. Kaj tiujn, kiuj bremsas oni ne konsideru malprogresuloj fordormintaj la modernan tempon, aŭ sen artisma kaj lingvistika komprenivo.

Mun ankoraŭ kelkaj rimarkigoj. Mia opinio redoni slangajojn, dialektajojn, ĵargonojn estas malfacila kaj stumbliga afero en Esperanto. Ekzemple mi opinias "Kiaĉun Ferdinandon ..." misforma. Ĝenajn virinajn nomojn oni en Esperantaj tekstoj lasu en la originala formo kaj ne skribu Helena Vondráček, Božena Němec, Věra Novobilský, Jana Miler, sed ĉiam Helena Vondráčková, Božena Němcová, Věra Novobilská, Jana Milerová ktp. Tiel oni skribas ankaŭ en aliaj fremdaj lingvoj, ekz. germana, angla, k.a. Nur ĝe neĉefinoj oni uzu la respektivajn formojn: Anne Müller, Mary Brown, Janette Jahier k.s. Same en tradukoj el la ĉefia en Esperanton oni modifu la proprajn nomojn al formoj Esperantaj aŭ de la koncerna lingvo, de kiu la loknomo aŭ la persona nomo devenas. En iu gvidfolio mi foje legis: Karel **MAY** ŝipveturadis ofte el Dráždany sur Labe al Ústí nad Labem. Ĝuste devus teksti: Karl /Karlo/ **MAY** ŝipveturadis ofte el **DRESDEN** /Dresdeno/ sur Elbo al Ústí nad Labem.

Riproĉeton sur p. 23, ke Březina kaj Halas atendas sian kongenian tradukon, mi nur parte agnoskas. Ekz. de Březina estis dum lia jubileo preparita antologio el liaj poemaroj far Tomáš **PUMPR** kaj Jiří **KOŘÍNEK**, sed poste la eldono ne realigis. Ankaŭ de Halas estas tradukoj, ekz. la poemaro **NIA SINJORINO BOŽENA NĚMCOVÁ** far Jiří **KOŘÍNEK**. Kompreneble plejparto, kiel ĝe aliaj poetoj kaj verkistoj, atendas bonajn, se ne samgeniajn, tradukojn.

Kaj ĝe fino mi volus iom refuti la aserton sur p. 23, ke mi iom supermezure uzadas eliziojn. Ne pli multe ol aliaj poetoj kaj tradukistoj. Komparu ekz. la tradukon de **MAJO** far T.**PUMPR**. Se neĉese, por ne redukti la ideon, li ne hezitas en unu verso uzi eĉ tri eliziojn. Cetere ni memoru, ke en Esperanto elizio ne estas la eksterordinara krizkaza helpilo kiel en pluraj etnaj lingvoj, sed fundamenta organika konsistaĵo de la lingvo, sen kiu ĝi estus nekapabla por poezio kaj muzikaj tekstoj. Tion ne povas renversi kompostisto aŭ presisto, same kiel li ne povas neglikti la supersignojn. Meti apostrofon anstataŭ literon O aŭ A ne povas prezenti ian kroman laboron.

J. Kořínek

ESTONA PANORAMO. Kompilis Gunnar PAAL, eldonita en Soveta Socialisma Respubliko Estonio. Paĝoj 136, formato 14 x 19 cm, kartonita, prezo Kĉs 15,--.

Jen impona vaste informanta libreto kun multaj tutpaĝaj kaj koloraj bildoj, grafike moderne ekipita, kiun al la unu kaj duonmiliono estona popolo povas envii eĉ grandaj popoloj. Traleginto gajnas interesajn sciojn pri historio, kulturo, ekonomio, arto, literaturo, sporto, folkloro, Esperanto-movado kaj aliaj vivferoj de la brava simpatia baltlanda nacio.

Mirigas la eldonkvantoj de ĝiaj Esperantaj eldonaĵoj: 5 000 - 12 000. Mi citas frazon el la libro: "Pere de Esperanto la literaturo de nia unumiliono popolo atingis ĉiujn kontinentojn". Legadon agrabligas la dukolumna kompostado surpaĝe. Kun la belega grafika vesto konkuras bonega lingvaĵo.

La libro fariĝos ornamaĵo de ĉies biblioteko kaj konvinka propagandilo de Esperanto.

Jiří Kořínek

ESPERANTO EN LA MODERNA MONDO - ESPERANTO IN THE MODERN WORLD. Studoj kaj artikoloj pri lingvaj problemoj, la Rajto je Komunikado kaj la Internacia Lingvo /1959 - 1982/. 600 paĝoj, firme bindita dulingva informlibro. Proksimuma prezo Kĉs 600,--.

Aperis libro pri Esperanto, kiu laŭ sia graveco nur estas komparebla al "ESPERANTO EN PERSPEKTIVO" publikigita en 1974, tamen ĝi tute ne estas ripeto aŭ modernigo de tiu nomita kompendio, sed libro kun tute alia aparta karaktero. Redaktis ĝin Rüdiger kaj Vilma Sindona EICHHOLZ kiu aperigis ĝin en sia propra eldonejo ESPERANTO PRESS, Bailieboro, ONTARIO, Kanado. La eldonnombro de la libro estas 3 000 ekz.; ĝi estas ampleksigita kaj novigita sekvanto de antaŭa libro, aperinta 1981, kiu portis la titolon "Esperanto - la solvo de niaj lingvaj problemoj".

Kompare kun "Esperanto en perspektivo", kiu pli detale okupigas pri la movado kaj estas fonto de informoj por la esperantistoj, la eldonaĵo de la ge-EICHHOLZOJ turnas sin al la ekstera mondo, kio esprimiĝas jam per tio, ke ĝi estas dulingva. La plej multaj ĉapitroj aperas paĝe-ĉe-paĝe en Esperanto kaj en la angla lingvo. La enhavo konsistas el studoj kaj artikoloj pri lingvaj problemoj, la rajto je komunikado kaj la internacia lingvo. Oni povas distingi tri ĉefajn partojn. La unua estas prezento de Esperanto kaj ĝia kreinto kun vortareto, gramatiketo, ekzemploj el la literaturo. La dua parto analizas la mondan lingvan problemon kaj ĝian solvon pere de Esperanto. Tio estas la plej valora kontribuaĵo.

Oni tre estimas, ke en tiu libro estas represita kaj dank' al tio ĉiam denove trovebla kaj konsultebla la fundamenta artikolo resp. prelego de Claude PIRON aperinta 1980 en HEROLDO pri "La psikologia rezisto al la lingvo internacia".

Pri tute nova aspekto raportas la usona profesoro Bruce Arne SHERWOOD en artikolo kun la titolo "Parol-sintezado aplikata al lingvo-instruado". Tiu titolo ne estas tuj komprenebla al laikuloj, ĝi temas pri la produktado de parolata lingvo pere de komputilo surbaze de presita teksto. Evidente Esperanto

kun ĝia regula ortografio prezentas al la komputilo malpli da malfacilaĵoj ol aliaj lingvoj. La aŭtoro priskribas tion kaj poste la praktikan aplikon en la lingvoinstruado.

La lasta parto de la libro estas dediĉita al tio, kion promesas ĝia titolo, nome "Esperanto en la moderna mondo". Ĝi informas pri la stato de la Esperanto-instruado en la diversaj landoj kaj poste donas superrigardon pri la diversaj praktikaj aplikoj kaj atingoj de Esperanto helpe de represitaj eltiraĵoj kaj bildoj el esperantaj periodaĵoj, turismaj reklamiloj, libroj, eĉ el PIV kaj la Enciklopedio. Listo de libroj kaj Esperantaj organizoj kompletigas tiun panoramon, kiu al praktika esperantisto alportas nenion novan, sed al eksteruloj havigas valorajn informojn.

Entute temas pri libro, kiu ne nur beligas ĉiun mondlingvan bibliotekon, sed estas referenca fonto, kiun oni ĉiam denove konsultos.

)Lingva angulo(

L A V E R B A J A S P E K T O J E N E S P E R A N T O

Lau Plena Gramatiko "la kategorio de la aspekto estas enkondukita de Zamenhof mem, verŝajne pro slavaj influoj". La Esperantaj verbaj aspektoj vere similas al tiuj en la slavaj lingvoj, sed PG prilaboras ilin alimaniere. Ŝajnas al mi necese ŝanĝi la koncernan ĉapitron en PG kaj malsupre mi prezentas pro diskuto provon de nova prilaboro.

La verbaj aspektoj montras la agon en ĝia daŭro /li iris/ aŭ rezulto /li venis/, en ĝia komenciĝo /li eklegis la libron/ aŭ finiĝo /li finlegis la libron/ aŭ ripetigo /li relegis la libron/, en ĝia momenteco /ekfulmis/ aŭ ofteco /fulmadis/. La plej gravaj aspektoj estas la daŭra kaj la rezulta, sen kiuj ne povas ekzisti la ceteraj: li finlegis la libron /rezulto/, li estis finleganta la libron /daŭro/. Tial la aspektoj daŭra kaj rezulta estas BAZAJ, dum la ceteraj estas aspektoj SUPLEMENTAJ.

1 Lau la bazaj aspektoj oni povas klasi la verbojn en kvar kategoriojn:

1.1 La verboj de NURA DAŬRO /ami, vivi, koni, scii k.a./. Ĉi tiuj verboj ne havas la rezultan aspekton, nur la daŭran, tial iliaj preteritaj participoj ne montras rezulton, sed ĉeson de daŭro, ili enhavas sencen de "ne plu": aminta - ne plu amanta, amita - ne plu amata, vivinta - ne plu vivanta. Escepte oni povas uzi ĉi tiujn participojn kiel epitetojn de substantivoj: amataj kaj amitaj infanoj, vivantaj kaj vivintaj aŭtoroj. Sed en la kompleksaj tempoj oni ne uzu ilin: li estis amata /ne: li estas amita/, li estis konata /ne: li estas konita/.

1.2 La verboj de NURA REZULTO /perdi, forgesi/. Ĉi tiuj verboj enhavas agon kun tre mallonga daŭro, preskaŭ kun nenia, tial oni ricevas tuj la rezulton. Tre ofte oni rimarkas la agon nur post konstato de la rezulto /la ŝlosilo mankas, do ĝi estas perdita/. Iliaj prezencaj participoj ne esprimas la daŭran

aspekton, sed oftan ripetadon de la rezulto /perdata ŝlosilo - oni perdas ĝin ofte; forgesata afero - oni forgesas ĝin ofte aŭ iom-post-ione/. Kelkaj verboj de ĉi tiu kategorio montras per prezenca participo provon aŭ klopodon pri la realigo de la ago /kaptante fiŝojn li post du horoj sukcesis kapti unu karpon/.

1.3 La verboj de DAŬRO KUN REZULTO /skribi, konstrui/. Ili montras agon, kiu daŭras certan tempon kaj restigas ian rezulton, ekzemple: post longa skribado restas letero, post longa konstruado restas domo. Ĉi tiuj verboj per la prezenca participo esprimas la daŭran aspekton /homo skribanta leteron, longe konstruata domo/, per la preterita participo la rezultan aspekton /homo skribinta leteron, jam konstruita domo/. La daŭra aspekto montras, ĉu la ago okazis aŭ ne /la letero estis skribata, ne estis skribata/, sed ne diras, ĉu la ago estis sukcese finita. La rezulta aspekto informas ĝuste pri tiu sukceso aŭ malsukceso /la letero estas skribita - oni sukcesis skribi ĝin ĝis la fino/. En la slavaj lingvoj ekzistas la t.n. verbaj aspektaĵoj duopoj /psát - napsat/, el kiuj unu verbo montras la daŭran aspekton /psát/ kaj la alia la rezultan aspekton /napsat/. En Esperanto ekzistas por ambaŭ aspektoj kutime nur unu verbo /skribi/, kiu laŭ situacio esprimas jen la daŭran aspekton, jen la rezultan. Tamen ankaŭ en Esperanto estas kelkaj agoj esprimataj per similaĵoj duopoj: peli /daŭro/, alpeli /rezulto/, porti - alporti, kuri - alkuri, veturi - alveturi, iri - veni, flugi - alflugi ks. Vidu la ekzemplon: Li pelis la bruton du horojn /daŭro/ kaj alpelis ĝin en la vilagon /rezulto/. La laŭta verbo samtempe esprimas la finan aspekton, pri kiu ni ankoraŭ parolos kaj kiu povas esti ankaŭ kaj rezulta kaj daŭra /li estis alpelanta la bruton - li jam estis proksimiganta al la celo/. Komparu: pelata bruto /oni ĝin nun pelas/, pelita bruto /ne plu pelata bruto/, alpelita bruto /ĝi jam estas en la celo/, alpelata bruto /ĝi ĝuste proksimigas al la celo/.

1.4 La verboj HIBRIDAJ /kovri, ilustru, okupi/. En Esperanto estas kelkaj verboj, kiuj havas du signifojn, el kiuj unu estas rezulta kaj la alia daŭra, ekzemple: kovri - 1. meti kovrilon /rezulto/, 2. kuŝi kovrante /daŭro/; ilustru - 1. desegni bildojn por libro /rezulto/, 2. esti en libro por ornami /daŭro/; okupi - 1. preni en posedon /rezulto/, 2. teni en posedo /daŭro/. Oni povas diri, ke la patro kovris la plankon per tapiŝo kaj nun la tapiŝo kovras la plankon, do la planko estas kovrita per tapiŝo kaj samtempe kovrata de tapiŝo. Pentristo ilustris libron per bildoj kaj nun la bildoj ilustras la libron, do la libro estas ilustrita de la pentristo per bildoj kaj samtempe ilustrata de bildoj. La patro okupis la seĝon /eksidis, prenis ĝin en posedon/ kaj nun okupas ĝin /sidas sur ĝi, tenas ĝin en posedo/, do la seĝo estas okupita kaj samtempe okupata de la patro. "Okupata seĝo" el la vidpunkto daŭra estas seĝo, sur kiu iu sidas /tenas ĝin en posedo/, el la vidpunkto rezulta ĝi estas seĝo, sur kiun ĝuste nun iu eksidas /prenas ĝin en posedon/. Sed la lasta senceno ne estas uzata. Tial "okupita seĝo" kaj "okupata seĝo" signifas la saman: seĝo, sur kiu iu sidas. Pli ofte estas uzata "okupita seĝo", kio estas nur simpla konstato, ke la seĝo ne estas libera, dum "okupata" akcentas, ke oni ankoraŭ ĉiam sidas sur la seĝo. En la aktiva voĉo estas la situacio mala: "homo okupanta seĝon" es-

tas simpla konstato, ke la homo sidas, dum "homo okupinta" seĝon akcentas, ke li jam trovis seĝon kaj eksidis. Komparu ankoraŭ du ekzemplojn: La patro estas kovrinta la plankon per tapiŝo, do la tapiŝo estas kovranta la plankon. La patro estas kovranta la plankon per tapiŝo - li guste nun metas la tapiŝon.

2 Esperanto havas rimedojn por esprimi kvin suplementajn aspektojn:

2.1 La KOMENCA aspekto: la suno ekbrilis, mi eklegis la libron, mi sidigis sur seĝon, mi enamigis al ŝi, ktp. La komenca aspekto estas kreata per EK- kaj -IG-, sed ne ĉiuj iliaj derivaĵoj montras la komencajn aspektojn: "ruliĝi, fulmo ekbrilis, pordo fermigis" ne estas komenciĝoj.

2.2 La FINA aspekto: finlegi libron, alpeli bruton, formangi panon, tralerni lernolibron, ellerni lingvon, satmangi fruktojn, tutpleniĝi aliĝilon ktp. La fina aspekto estas kreata per diversaj prefiksoidoj.

2.3 La RIPETA aspekto: relegi libron, rediri prelegon, revidi amikojn, reverkli romanon ktp. La ripeta aspekto signifas "fari ion ankoraŭfoje" kaj estas derivata per RE- /sed ne konfuzu ĝian signifon kun la signifo de "reen": redoni, reveni/.

2.4 La MOMENTA aspekto: fulmo ekbrilis, li ekstremis, ekmoviĝu ktp. La momenta aspekto estas kreata per EK- same kiel la komenca.

2.5 La ADA aspekto: legadi librojn, sidadi en la parko, la koro batadis, fulmadi, tremadi ktp. La ada aspekto esprimas agon multfoje kaj ofte ripetatan: sidadi - ofte sidi, legadi - ofte legi, batadi - multfoje bati /koro/, ofte bati /patro filon/. Ĝi povas signifi ankaŭ unu agon longe daŭrantan sen interrompo, sed en tiu senco oni preferas uzi la prezencan particon: ŝi longe sidadis apud li - 1. ŝi estis longe sidanta apud li /au nur: ŝi longe sidis apud li, sed ĉi tiu formo ne akcentas tiom la longecon de tempo/; 2. ŝi longe kaj ofte estis sidanta apud li. La praktiko nuntempe preferas la duan signifon. Tamen en substantiva formo -ADO signifas longan daŭron: sidado, legado, batado, fulmado, tremado. La particonoj kun -AD- ne estas uzataj pro siaj pezeco kaj malbonsoneco: sidadanta /prefere: ofte sidanta/, legadata /ofte legata/.

La klasado de verboj laŭ aspektoj ne estas en Esperanto tiom strikta kiel en la slavaj lingvoj. La sama verbo en diversaj situacioj povas havi diferencajn aspektojn: la suno ekbrilis /komenca rezulto/, la fumo ekbrilis /momenta rezulto/, la suno estis ekbrilanta /komenca daŭro/, la fulmo estis ekbrilanta /momenta daŭro/, peli /nura daŭro/, forpeli /daŭro kun rezulto/ ktp.

M. Malovec

Ĉ U D E A Ŭ D A ?

Ni ricevis ampleksan leteron de s-ano Leon ZIMELS /Teatralnaja strato 6/4, 282 000 TERNOPOĴ, USSR/ pri tiu ĉi ofta problemo.

S-ano L. ZIMELS skribas:

Multestimataj samideanoj,

mi sisteme tralegis en STARTO /6/1980/ en artikolo ĈU ESPERANTO ESTAS FACILA LINGVO? rimarkon pri tio, ke post -ONOJ

oni ĉiam uzu DE, neniam DA. La konfirmo de tiu aserto mi opiniis la § 14 de la Ekzercaro en Fundamento de Esperanto.

Kiam mi rimarkis ĉe multaj miaj kamaradoj analogajn erarojn, mi ĉiujn atentigis pri tio - ĉiuj facile konsentis. Nun unu mia kamarado oponas - li opinias, ke tiu regulo taugas ne ĉiam. Li komentas, ke oni povas diri DUONO DE BUTELO kaj DUONO DA BUTELO - en la unua kazo temas pri la butelo mem, pri la materia korpo de butelo, en la dua kazo temas pri la enhavo de la butelo. Li argumentas tiamaniere: post DUONO, same kiel post ekzemple GRUPO, estas uzataj DE-DA depende de konkretaj cirkonstancoj. Oni ne rajtas aserti dogme "NUR TIO AŬ TIO". Se temas pri ujo, tiam DUONO DE kaj DUONO DA estas absolute diversaj nocioj, kaj surbaze de dogmo anstataŭigi unu per la alia estus erare kaj erarige. Unu signifas fragmenton de la frakasaĵo ujo, dum alia estas duonpleno da materialo /fluido, pulvoro, .../ en ujo. Ekzemplo: Li trinkis akvon el botelo. Kiam li eltrinkis duonon da botelo, la botelo krevis - duono de botelo restis en liaj manoj kaj duono de botelo falis sur la teron.

Mi petas vin bv. komenti tion kaj precizigi la regulon pri uzado DE-DA post -ONOJ.

Mi dankas al vi anticipe. Kun sincera estimo

Leon ZIMELS

Kaj detala respondo de s-ano Jiří KOŘÍNEK /Fučíkova str.69, CS-400 01 USTÍ NAD LABEM, ĈSSR/:

Tre estimata samideano Zimels, mi dankas por via letero de la 14-a k.m., kiu min gojigis per tio, ke ĝi atestas, ke nia STARTO estas multloke legata kaj ke samideanoj interesiĝas pri profunda lingvoscio kaj gramatikaj subtilaĵoj.

Vere la Ekzercaro en Fundamento de Esperanto, la Plena Gramatiko de Esperanto en par. 261, la PIV sub "DA" kaj "ON" postulas antaŭ esprimo de substantivoj montrantaj per si mem precizan kvanton, do post onoj prepozicion DE. Tiu ĉi regulo povus esti event. atakata tial, ĉar ZAMENHOF iam, tre malofte, ĝin ne obeis, kiel cetero ankau iujn aliajn, eble eĉ pro plumeraro. Tiel inter pluraj gustaj uzoj ankau Zamenhofan frazon "DUM TRI KVARONOJ DA JARO" listas PIV sub "ON"!

Sed generale nunaj lernolibroj postulas post esprimoj de ONO/J/ prepozicion DE. La deduktado de via oponenta kamarado bazigas sur eraro. Ne gravas ĉu temas pri peco de la rompita botelo au pri mezurkvanto, ambaŭkaze ĝuste estas DE. Ĉar tiu trinkinto ja ne trinkis kvanton da botelo, sed kvanton da akvo. Duono de botelo estas kvantindiko - komplete devus teksti DUONON DE BOTELO DA AKVO. Kompari kun grupo da soldatoj kaj grupo de soldatoj, au bukado da rozoj kaj bukado de rozoj ne eblas. Ĉi tie temas pri io diferenca: pri kvantindiko kaj indiko de speco. Do seneraraj estas jenaj frazoj: Li eltrinkis duonon DE botelo DA akvo. Li eltrinkis duonbotelon DA akvo. Li eltrinkis botelduonon DA akvo. Duono DE botelo forrompiĝis.

Ni rigardu scenon el vakera filmo: Kiam Ĝou estis trinkinta duonon DE botelo DA brando la Sovaĝa Tom ekpafis kaj Ĝou tenis en la mano duonon DE botelo ankoraŭ plenan DE brando. Li sen



POR VIA KOMFORTO UTILIGU
ALSENDAN SERVON !

BRATISLAVA



ŘÁDKY O DĚČÍNSKÉM ZÁVODĚ VD MECHANIKA

by bylo možné začít hádankou, kdybychom položili otázku, že zde opravují to, bez čeho se nesmí vydat na silnici žádný automobil s nosností nad 5 tun. Ale protože se v posledních letech velmi často hovoří o úsporném provozu nákladní dopravy na našich silnicích, asi by nebylo těžko takovou otázku zodpovědět.

Tachograf se v mnohém podobá hodinám. Mezi těmito přístroji je však zásadní rozdíl. Zatímco hodiny člověku slouží k informaci o čase, tachograf, jsme-li např. řidičem pětituny, podává svědectví o nás - jak efektivně a hospodárně s vozidlem nakládáme. To však nic nemění na skutečnosti, že mezi sedmdesáti pracovníky závodu TACHOGRAFY VD MECHANIKA TEPLICE, kteří těmito přístroji vdechují znovu život, je vedle mechaniků i několik hodinářů.

Opravy tachografů se v Děčíně zabývají už dvacet let, kapacitou celého závodu od roku 1972. Zájem o tuto službu výrazně vzrostl potom, co vstoupila v platnost vyhláška 32/1972, která ukládá vybavit těmito přístroji všechna vozidla, která mají vyšší nosnost než 5 tun. Od roku 1976 je závod smluvní opravnou tachografů firmy Messgerätewerk Erich Weinert v NDR, která je pověřena jejich výrobou v rámci RVHP. Do konce roku 1967 závod souběžně opravoval i tachografy tuzemské výroby, pro nedostatek náhradních dílů však musel od této činnosti upustit.

Opatření ke z hospodárnění silniční dopravy se promítla do vzrůstu zakázek v závodě TACHOGRAFY DĚČÍN. Zatímco v roce 1976 zde opravili 12,5 tisíce přístrojů, bylo jich loni už přes dvacet tisíc. Problémy s touto činností spojené vedly vedení družstva k operativnímu rozhodnutí přičlenit k závodu provozovnu mimo Děčín, kde se podařilo v krátké době vytvořit podmínky a zaučit pracovníky. Toto řešení se příznivě projevilo ve zkrácení dodacích lhůt oprav pro smluvní partnery na 1-3 měsíce a dokonce i k rozšíření kapacity na op-



CELOSTÁTNÍ SERVIS TACHOGRAFŮ NDR

PROVÁDÍ

**MECHANIKA
TEPLICE**

**ZÁVOD TACHOGRAFY
JERONÝMOVA 7a
405 21 DĚČÍN**

3

ravy tachografů firmy VDO z NSR, kterými jsou vybaveny naše vozy kamionové dopravy TIR, s čímž se počítá ještě v letošním roce.

Adresa závodu TACHOGRAFY VD MECHANIKA -
Vedení závodu a příjem zakázek :
D ě č í n IV, Jeronýmova 7/a, tel. 22813,
PSČ 405 21



Karlovy Vary
Jáchymov
Jánské Lázně
Luhačovice
Františkovy Lázně
Teplice v Čechách
Třeboň
Teplice nad Bečvou
Mariánské Lázně
Poděbrady
Jeseník



ŠLOSILO AL VIA SANO ĈEĤOSLOVAKAJ BANEJOJ



KURACRESTADOJN EN ĈEĤOSLOVAKAJ BANEJOJ CERTIGAS
KAJ PLUAJN INFORMOJN PRI UNUPAJ BANEJOJ DONAS:

BALNEA, reprezentace československých lázní a zříděl,
Pražská 11, 110 01 Praha 1, ČSSR
Telex 122 215, Telefon 263 777

tiko de palpebro, alpaŝis Tomon kaj jetverŝis la restintan kvanton DA brando /aŭ de la brando/ en lian vizagon ...

Ja ofte oni ankaŭ eraras pri prepozicio post PLENA. PLENA ne estas kvantindiko, sed statindiko. Tial: glaso plena DE akvo, plenglaso DA akvo. Do resume via frazo tekstu: Li trinkis akvon el botelo. Kiam li eltrinkis duonon de botelo, la botelo krevis - duono de botelo restis en liaj manoj kaj duono de botelo falis sur la teron.

Mi esperas, ke tio klarigas la problemon. Mi estas ĉiam preta al vi servi kaj salutas vin tre kore.

Via

Jiří KOŘÍNEK

DE KIE DEVENAS LA UNUOBLIGO DE DUOBLAJ KONSONANTOJ?

Plena Analiza Gramatiko de Esperanto asertas, ke sistema unuobligo de duoblaj konsonantoj, kiu estas aparta karaktero de la Esperanta ortografio, estas pruntita el rusa lingvo / Plena Analiza Gramatiko, § 6 /. Tion ripetas ankaŭ aliaj aŭtoroj. Ekzemple, d-ro André ALBAUT skribas: Eble el la rusa lingvo, kiu ordinare evitas duoblajn konsonantojn, Zamenhof elektis kelkajn kulturvortojn kaj proprajn nomojn kun tiu apartaĵo / d-ro André ALBAUT: KONTRIBUO AL LA ESPERANTA TOPONIMIKO, en AKADEMAJ STUDOJ, 1983, Esperanto Press, Bailieboro, Ontario, Kanado, p. 181 /.

Jes, fakte, la fonetiko de rusa lingvo malpermesas kombinojn el du samaj konsonantoj, ekzemple SS, ZZ, NN k.s./Akademio de Sciencoj de USSR, Instituto de rusa lingvo, RUSSKAJA GRAMMATIKA /rusa gramatiko/, Moskvo, 1982, p. 43, 44/. Sed eĉ en pure rusaj vortoj ne malofte aperas duoblaj literoj, ekzemple SSŪRA, RAZZADŌRITJ, LUNNAJA. En tiaj okazoj oni prononcas duoblajn konsonantojn kiel longajn: S, Z, N.

Do, rusa lingvo ne unuobligas duoblajn konsonantojn, ĝi nur devigas prononci ilin alimaniere ol unuoblajn. Krome, rusa lingvo asimilis multajn internaciajn vortojn kun duoblaj konsonantoj el aliaj eŭropaj lingvoj, kaj ĝi tamen ne unuobligis ilin. Ekz.: ALLIGATOR, ALLOTROPIJA, DISSERTACIJA, KASSA, KASSETA, KOLLEGA, KOLLEKTIV, KOMISSIJA, KOMMUNIST, KORROZIJA, METALLOGRAFIJA, MISSIJA, TERRAKOTA, TERRITORIJA. En ĉi tiuj vortoj oni prononcas duoblajn konsonantojn kiel longajn sonojn. Nur kiam duoblaj konsonantoj troviĝas fine de la vorto, oni prononcas ilin kiel unuoblajn, ekz. en la vortoj BERILL, KOMPROMISS, KORALL, KRISTALL.

Kaj nun ni komparu la samajn vortojn el pola lingvo: ALIGATOR, ALOTROPJA, DYSERTACJA, KASA, KASETA, KOLEGA, KOLEKTYW, KOMISJA, KOMUNISTO, KOROZJA, METALOGRAFIA, MISJA, TERAKOTA, TERASA, TERYTORIUM; BERYL, KOMPROMIS, KORAL, KRYSZTAL / Bolŝoj polsko-ruskiĵ slovarj, Moskvo - Varsovio, 1980 /.

Kiel ni vidas, pola lingvo sencere monie elĵetas superfluaĵajn literojn el asimilitaj fremdaj vortoj. Kiel ortografie, tiel ankaŭ fonetike, tiuj ĉi vortoj en du komparataj lingvoj diferencas inter si. Fakte, nur pri POLA lingvo oni rajtas aserti, ke ĝi UNUOBLIGAS DUOBLAJN KONSONANTOJN, ĉar nur en ĝi oni ilin SKRIBAS KAJ PRONONCAS kiel unuoblajn. Nu, ekzistas ankaŭ aliaj lingvoj kun la sama emo /ekzemple la ukraina, ĉeĥa/, sed rila-

te al Zamenhof ni devas unuavice konsideri la polan.

Do, la konkludo: la unuobligo de duoblaj konsonantoj estis pruntita ne el rusa lingvo, sed el la pola.

Vladimir Gakalenko,
Tifvin, USSR.

el fervojojista movado

LA KINEJO EN TRAJNO

Argentinaj fervojoj establis du novajn luksajn trajnojn, en kiuj oni proponas al pasaĝeroj viziton de la vagono, en kiu oni eblas vidi filmojn. Unu rapidtrajno nomiĝas INDEPENDENCIA kaj ĝi trafikis dufoje semajne sur 1157 km longa fervojlinio Buenos Aires - Tucuman; la vojaĝo daŭras 17 horojn kaj duonon. Alia rapidtrajno nomiĝas LIBERDADOR kaj ankaŭ ĝi trafikis dufoje semajne el Buenos Aires al Mendoza. La veturtempo estas 16 horojn kaj 35 minutojn.

LA MAGNETA PENDLINIO

Evoluo de la fervoja trafiko gvidas al altigado de transportkapacito kaj rapidecoj. Tio devigas serĉi novajn teknikajn projektojn. La firmao SIEMENS eluzis siajn longjarajn spertojn en elektronika fako kaj kunlabore kun aliaj evoluis novajn elektrokomponentojn - la superkonduktajn magnetojn, kiuj anstataŭas radojn kaj ebligas superpendon de vagonaro super konduktlamenoj en alteco dek ĝis dek kvin centimetrojn. Oni supozas, ke rapideco de tia trajno estos ĝis 500 km en horo.

LA FURIOZIGINTA TRAJNO

Pli ol cent kilometrojn traveturis en Bangladeŝo ŝarĝtrajno sen lokomotivestro ol oni sukcesis haltigi ĝin helpe de alia lokomotivo. La oficoj ne kapablis ekspliki, kial tio estis ebla, ke la trajno memvole ekveturis kaj dum preskaŭ tri horoj veturis per proksimuma rapideco 40 km en horo. Trafiklaborantoj en diversaj fervojstacioj rapide preparis liberajn trakojn por traveturo de la trajno.

LA KAJUTLINIO EN BIRMINGHAM

En 1984 oni ektrafikos sur 600 metrojn longa kajutlinio, kiu en Birmingham kunligos flughavenon kun fervoja stacidomo. La menciitan distanceton trakuros la veturilo, apartigita de la veturlinio per efiko de magnetfortoj dum 90 sekundoj. Oni antaŭvidas transporton de 760 pasaĝerojn en horo en ĉiu direkto.

KION NI SCIAS PRI METROO

La unua metroo estis konstruita antaŭ 120 jaroj en Londono kaj oni nomis ĝin UNDERGROUND. Poste oni konstruis subteran fervojon en Chicago kaj Glasgow. Sur eŭropa kontinento oni konstruis la unuan subteran fervojon en Hungario en 1896. Kvar ja-

rojn poste ekfunkciis la subtera fervojo en Parizo. Parizanoj ankaŭ komencis nomi sian subteran fervojon METROO. Metroo estas fakte mallongigo de la vorto métropolitain, kio signifas ĉefurbo.

Kvankam tiu ĉi termino estis tute nepreciza, oni vaste akceptis ĝin en la tuta mondo. En la jaro 1931 oni konstruis metroon en Moskvo kaj poste venis vico de aliaj socialismaj landoj.

Kompilis J. Tomášek

el leterkesto

Estimataj kaj karaj gesinjoroj,

kun ĝojo mi ricevis de vi la senditajn revuetojn **STARTO**. Ĝi similas al nia Budapeŝta Informilo, kiun vi tute certe konas. Tamen mi povas kaj en la estonteco povos legi en ĝi pri tiaj aferoj, kiuj en nia revueto ne aperas. La abonprezo de via revuo por unu jaro estas vere ne multekosta kaj **STARTO** estas bonaspekta.

Ankoraŭ en tiu ĉi monato mi abonos vian revuon kaj eĉ persone ne konante - nur laŭ artikoloj, ĉefe gramatikaĵoj - mi estime salutas sinjoron Jiří Kofínek.

Estime salutas vin
István FEHÉR
Budapeŝto

Veterana esperantisto, Frank BUCKLEY, angla advokato, jubileas sian sepdekan jarfeston per rondvojaĝo al grupoj kaj kunvenoj multelandaĵe donante sian lumbildan kaj magnetofonan prezentadon **KVINDEK JAROJN DE LABORO POR ESPERANTO**.

Grupoj kaj societoj kiuj deziras viziton de s-ano Frank

BUCKLEY dum jaro 1984 povas skribi al li: 620 Filton Avenue, BRISTOL, BS12 7LD BRITUJO. B. E. S.



Mr F. Buckley

RADIO POLONIA, E-REDAKCIO, VARSOVIO, POLLANDO.

Estimataj, ni havas por vi nian novan programon - informilon pri la 6 ĉiutagaj elsendoj de RADIO POLONIA. Ni atentigas vin pri diversaj novaj programeroj, ekz. pri la dimanĉa rubriko por komencantoj. Ĉi-foje

en la program-informilo ni publikigis krome nian konsilaron KIEL AŬSKULTI PLI BONE? Ni esperas, ke la konsiloj helpos la akceptadon de niaj elsendoj kaj pro tio ni tute aparte rekomendas nian plej novan program-informilon al ĉiuj esperantistoj, kiuj interesigus pri la utiligo de E-o en radioinformado kaj pri la apliko de la E-lingvaj elsendoj por la profundigado de sia lingvokono.

Al ĉiuj, kiuj skribos al ni kaj deziros ricevi la menciitan program-informilon, ni tuj sendos gin senpage. Nia adre-

so: RADIO POLONIA, E-redakcio, VARSOVIO, Pollando.

Samtempe ni sendos al vi la regularon de nia plej nova konkurso, kiu ĉi-foje estas dediĉita al muzika temo. La internacia karaktero de la muziko bele kongruas kun la internacieco de E-o kaj ni ne dubas, ke multaj personoj partoprenos nian konkurson, tiom pli, ke en la pasinteco jam pli ol 20 diverslandaj esperantistoj gajnis la konkurson ĉefpremion en la formo de rondvojaĝo tra Pollando.

Kun sincera saluto

ESTRO DE LA REDAKCIO

Andrzej PETTYM

RONDETA VIVO

H A V Í Ŝ O V

La 15-an de decembro 1983 -sano Vlado SLÁDEČEK prelegis pri siaj partoprenoj de la turismaj arangoj en Slovakio, prezentis diapozitivojn, reproduktis kantojn. La ĉeestantojn kantigis kaj rakontis interesaĵojn pri sia esperantista vivo.

/A.St./

M N I C H O V O H R A D I Ŝ -
T Ě

La klubo regule kunvenadis dum la lerneja jaro ĉiusemajne /ĵaŭde 17,30 - 19,00 h./. En majo 1983 la klubo aranĝis lingvan seminarion /6 lektoroj, 109 partoprenintoj, pli parte la frekventintoj de la korespondaj kursoj/. Celo: paroligi la komencantojn, ebligi kontakton, acetoni de esperabtaĵoj, persona interkonatigo.

La klubo cirkulero VERDA

FAMILIO estis eldonita /1 700 ekzempleroj-eldonkvanto, 4 foje jare/. La cirkulero havis edukkan karakteron. Oni aperigis multajn kontribuojn de komencantaj aŭtoroj.

Ŭ S T Í N A D L A B E M

Kvar E-kursoj, dek monatkunvenoj, Zamenhof-vespero sub artisma gvido de M. SMYČKA, migra ekspozicio HIROŜIMA - NAGASAKI, ses informartikoloj en la ĵurnalo PRŬBOJ, diskuta letero al prof. SKÁČEL al ties libro JARO 2000 - LINGVO KIEL PONTO KAJ ABISMO, tri pactemaj poemoj en STARO kaj sep poemoj en FONTO /Brazilo/ kaj unu en BUDAPEŜTA INFORMILO /Hungario/ far Jiří KORÍNEK, kreado kaj dissendado de grafike alt-nivelaj kunveninvitiloj /geedzoj SOLC/ - tio estas nur kelke da informoj pri eminentega laboro de gesamjdeanoj en ĉi-tiu klubo. Bedaurinde ne eblas aperigi tutan unupagan raporton pri ilia E-ĝado. Ni ĉiuj dankas kaj aplaudas.

-kýz-

KRONIKO

KONATA PERSONO EN NIA ESPE-
RANTO-MOVADO S-ANO PAVEL SIT-
TAUER EL ESPERANTO-KLUBO EN
TRĚBÍČ, ORGANIZANTO DE SOMERAJ
ESPERANTO-TENDAROJ EN LANČOV,
ĜISVIVIS LA 4.1.1984 RONDAN
VIVO-DATON - 50 JAROJN. NI KO-
RE GRATULAS AL LI KAJ DEZIRAS
MULTE DA SANO!

LA SAMAN GRATULON NI ADRE-
SAS AL NIA KARA S-ANO DRAHOMÍR
KOČVARA, KONATA GVIDANTO DE
PORPACA MOVADO EN NIA LANDO
KAJ EN EKSTERLANDO. LI ĜISVI-
VIS LA 29.1.1984 55 JAROJN.KI-
EL TIU VIVO KURAS, KNABOJ!

Redaktoro de STARTO

Ni gratulas al Olga SIT -
TAUEROVÁ kaj Stanislav LACI-
NA kiuj geedziĝis 3. 12.1983.
Ĉion bonan por komuna vojo!

La 16-an de januaro 1984
ĝisvivis la okdekon la membro
de E-klubo en ŠUMPERK s-ano F.
K U D R el KUNČICE POD KRÁ-
LICKÝM SNĚŽNÍKEM. Li esperan-
tigis antaŭ 60 jaroj. Ĝis nun
li estas fervora Esperantisto.
Okaze de lia jubileo li estis
premita de Nordmoravia Espe-
rantista departementa komitato
de ĈEA diplomo por la laboro
en Esperanto-movado. Ni gratu-
las!

-OM-

Ota DIBELKA, el Skalice
u České Lípy, mortis 4. 1.1984
en la aĝo 87 jaroj. Li estis
membro de nia asocio.

Forpasis en Vimperk nia ak-
tiva membrino Dagmar BLÁHOVÁ.
Post longa kaj grava malsano
ŝi mortis 15.1.1984 en la aĝo
31 jaroj.

Honoron al ilia memoro!

Josef HANZELKA naskiĝis la
10.2.1908. Li esperantigis en
1927 kaj jam dum sia soldat-
servo instruis E-on al solda-
toj. Poste li studis mezgradan
ministan lernejon, farigis ski-
pestro kaj ankaŭ plenumis ins-
truistan ekzamenon pri Espe-
ranto. Gvidis kursojn en Rad-
vanice. Li estis tie komitat-
ano de E-societo NOVA VIVO, fon-
dita en 1933. Dum la milito li
transloĝiĝis al Ostrava - Kun-
čický kaj post la milito fon-
dis tie E-grupon. Longjare li
lektoris korespondajn kursojn,
zorgis pri gemeligo de espe-
rantistoj en Vítkovice kun la
volgogradaĵ k-doĵ. Membro de
ĈEA depost la fondiĝo, de kong-
resoj reprezentanto kaj dum la
lastaj jaroj de sia vivo hono-
ra komitatano de la grupo.

Li mortis 1.6.1983. La mova-
do perdis en li tre simpatian
kaj ŝatatan personon.

HONORON AL LIA MEMORO!



INFORMOJ EL SEKRETARIEJO

FUNDACION ESPERANTO, ZARAGOZA
Internacia Literatura Konkurso
FUNDACION ESPERANTO informis nin pri la VERDIKTO jene:

La adicio de la poentoj respektiva/ la 10.12.1983/ rezultigis:

1/ 30 poentojn al la konkursaĵo OSCAR KAJ LA MEVO, subskribita de ARALAR / aŭtoro Ana María RANERO, Salamanca, Hispanio/, al kiu estas aljuĝita la premio JUAN MIGUEL PIQUERO, kaj

2/ 29 poentojn al la konkursaĵo KIEL ĈIUJ KATETOJ, subskribita de NODETO / aŭtoro Agnieszka USAKIEWICZ, Warszawa, Pollando/, al kiu estas aljuĝita la subpremio JUAN MIGUEL PIQUERO.

La Patronaro dankas al la partoprenintoj pro ilia entuziasma klopodo vivigi Esperanton per siaj verkoj.

ITALA ESPERANTO FEDERACIO

La 54-a Itala Kongreso de Esperanto, okazinta en ALGHERO, Sardinio, oktobron 1983, elektis novan 21-personan Konsilion de Itala Esperanto Federacio. Prezidanto estas d-ro Renato CORSETTI.

IEF ankaŭ atentigas, ke ĉiu materialo por L'ESPERANTO /inkluzive de presitaĵoj por recenzo/ devas esti adresata al la redaktoro Aldo de'GIORGIVIA M. Anzi 19, 22100 COMO, Italio. Malnova adreso de la revuo /p.k.210, PISA/ estas nun nur de Itala Esperantista Junularo.

INTERESAĴOJ EL RUMANIO

En la almanako FLACĂRA / La

Flamo/ aperis la artikolo de d-ro Prof. Ignat Florian BOCIORT: Esperanto sau dreptul unei idei la adevăr și demnitate /E-o aŭ la rajto de unu ideo je vero kaj digno/.

La sama aŭtoro subskribas du novajn librojn: Mic manual de esperanto /Malgranda Esperanta lernolibro/ kaj Antologie de texte /Antologio de Esperant-kaj ruman-lingvaj tekstoj/.

Ekde ĉi jare la revuo NAPOCA UNIVERSITARA /La universitato Napoka/ el CLUJ-NAPOCA eldonas denove lecionojn de Esperanto sub la gvidado de s-ro Adrian CRENGĂNIȘ.

Ĉi jare aperis la dua numero de la turisma revuo FERIOJ EN RUMANIO eldonita de Ministerio de Turismo en kunlaboro kun Esperanto-klubo el BUKUREȘTO.

La semajna gazeto MAGAZIN /La Magazeno/ aperigis artikolon pri Esperanto kaj la turisma revuo ROMANIA PITOREASCA /La Pitoreska Rumanio/ aperigis noticon pri la UK en BUDAPEȘTO en sia 9-a n-ro 1983.

Kun la helpo de anoj de Lokala Esperanto-klubo el CLUJ-NAPOCA, la Distrikta Biblioteko de la urbo kompletigis sian E-fonduson kun novaj Esperantaj eldonaĵoj.

Ionel-Jeanell ONET

BRAVA SOLDATO ŜVEJK KAJ ...

filatelio? Ĉu io nova? Certe estas novaĵo almenaŭ esperante agado tiudirekte. Kion nekapablis ĉeĥaj filatelistoj-esperantistoj, tion faris GDR-ano kaj esperantisto Dr. Brosche. Vidu sube koverton kun tiu temo kaj ŝtampoj. Nis se-

kretariejo mendis por vi mal-
grandan kventon de tiuj koverto-
toj. Prezo por 1 ekz. estas 4
kronoj. Aldonu 1 Kĉs por sen-
dokostoj. Ĝblas pagi per ne-
stampitaj ĉeĥoslovakej PM aŭ
ankau per irp-kuponoj. 1 res-
pondkuponu por 1 koverto!
Aldonu 1 rpk por sendokostoj.



FILATELISTOJ, ATENTU!

Kiu interesigas pri la eks-
terlandaj PM kun kovertoj, skri-
bu al nia asocio. Ni ofertas
al vi 30 ekz. de la PM sur di-
versaj kovertoj por Kĉs 15,--
/inkluzive sendokostojn/. Mendi
kaj pagi vi povas ĉe nia sek-
retariejo pere de nestampitaj
ĉeĥoslovakej PM en la sumo su-
pre notita.

KONSTANTA INTERNACIA E-LERNEJO EN BYDGOSZCZ KAJ TORUŔ

En STARTO n-ro 6/1983 ni
skribis pri KIEL - Konstanta
Internacia Esperanto - Lernejo
en BYDGOSZCZ kaj TORUŔ en Pol-
lando. Ni ankaŭ publikigis du
supervidojn de la E-agadoj en
la 1984-a jaro.

Ni sciigas nun al vi:
semajna E-kurso en la Konstan-
ta E-lernejo en Bydgoszcz kaj
Toruń kostas Kĉs 790,-- senre-
spekte terminojn;
alia varianto de la Konstanta
E-lernejo en Bydgoszcz - kvin-
tagaj kursoj /de lundo ĝis ven-
dredo/ kostos nur Kĉs 570,--.

Bv. sendi viajn postulojn
kaj adekvatan monsumon tuj al

nia asocio. Ni certigos al vi
la restadon en Pollando.

KNIHY PRO VÁS A VAŠE DĚTI

- 1/ Přiznivci sportu si ještě pamatují na úspěšnou publika-
kaci základních hmatů se-
beobranu, kterou v esperan-
tu připravili naši členové
a přední odborníci v tomto
oboru, tak zvané české ško-
ly, pod názvem LA TRANS-
DORSOJETOJ - přechozy přes zá-
da. Autoři Ing. NOVÁK, Ing.
ŠPIČKA a Dr. HNÍK, podnikání
úspěchem zmíněné knížky, na-
psali další s názvem SINDE-
FENDOLOGIAJ STUDOJ. O zají-
mavém oboru lidské činnosti
i o nových esp. termínech se
dozvíte na 94 str. publika-
ce formátu A5. Cena Kĉs 20,--.
- 2/ Opět lze v našem sekreta-
riátě objednat knihu z MLR
určenou k výuce dětí. Jsou
to dva díly s názvem ESPE-
RANTO INTERNACIA I. a II. od
Dr. Istvána SZERDAHELYI. Ce-
na za oba díly je Kĉs 50,--.
- 3/ Ty, kteří dostávají STARTO
prvňe do rukou, znovu upo-
zornujeme, že nedávno vyšla
velmi zajímavá kniha o es-
perantském hnutí a to od
jeho vzniku, až do konce še-
desátých let, tj. do vzniku
našeho svazu. Jde o publika-
ci s dosud neuvěřitelnými ú-
daji. Rukopis Dr. Stanisla-
va KAMARÝTA: HISTORIO DE LA
ESPERANTO-MOVADO EN ĈERO-
SLOVAKIO čekal na své vydá-
ní přes 25 let. Publikace
má 256 stran formátu A5, ce-
na Kĉs 42,--. Neměla by chy-
bět ve Vaší knihovně. A je
to bezesporu i vhodný dárek
do zahraničí.
- 4/ Poslední v řadě naši nabíd-
ky je naše učebnice pro dě-
ti s pracovními texty, urče-
ná dětem již od třetí tří-
dy ZŠ. Učebnice je vhodně
doplněna kresbami. Má název

ESPERANTO I a to znamená, že brzo vyjde druhý díl. Už je vytištěn a v době expedice tohoto čísla **STARTA** by měl být na skladě. Cena **ESPERANTO I** je Kčs 14,--, druhý díl bude stát Kčs 15,--.

Všechny zmíněné tituly si můžete objednat na korespondenčním lístku, který je vložen uprostřed časopisu vedle evidenčního štítku.

-aš-

RESUMO: oferto de novaj E-libroj kaj lernolibroj por la lerneja junularo.

DANKON!

Nia redakcio kaj sekretario de asocio ricevis dum la jarŝango kelke da centoj de gratuloj en kiuj vi esprimis siajn bondezirojn. Ĉar ne eblas persone danki al ĉiuj - ekzemple ĉi tiu n-ro de **STARTO** ne povus aperi - ni dankas nun al ĉiuj kaj same deziras al vi multon da sano, feliĉon, vivon en paco kaj sukcesan poresperantan laboron.

KONKURSO DE INTERNACIA ASOCIO MONDA TURISMO

Se vi skribos pri ĉiuj sube notitaj tri temoj minimume unu tajpitan folion /aparte/ kaj sendas ĝin al la vicprezidanto de **MONDA TURISMO** s-ino **Elizabeto PALLÓS**, Ybl. Miklos u. 9, 1/2, H - 7633 **PÉCS**, Hungario, ĝis la 30-a de septembro 1984 vi povas gajni senpagan partoprenon en iu de subaj E-aranĝoj okazontaj en la jaro 1985.

TEMOJ:

- 1/ priskribu vian agadon en la Esperanto-turismo;
- 2/ kiujn opiniojn vi havas pri E-aranĝoj kaj kiujn eventualajn plibonigojn vi proponas?

3/ kiajn novajn kaj interesajn trajtojn pri kulturo de alia popolo aŭ socio vi trovis pere de E-turismo? kiujn proponojn eventuale vi havas koncerne interŝanĝon de kulturaĵoj pere de Esperanto-turismo?

La estraro de **MONDA TURISMO** pritraktos la konkursaĵojn kaj aljuĝos la premiojn dum la 10-a Internacia Foiro de Esperanto-Turismo okazonta en **Bydgoszcz-Varsovio /Pollando/** de la 21-a ĝis la 28-a de oktobro 1984.

PREMIOJ: unusemajnaj restadoj en **SVEDIO, FINNLANDO, TURKIO, BENELUKSO**, partoprenoj en la 14-a Vintra E-Ferio en **BUDAPEŬTO /H/**, semajno de Internacia Amikeco 1985 en **PÉCS /H/**, **ZAMENHOF** Internacia Pacmarŝo 1985 en **VERŬCEMAROS /H/**, 10-aj Tagoj de **BYDGOSZCZ /PL/**, 18-a Internacia Renkonto Naturamika en **ABALIGET /H/**, **TUSE** - turisma semajno en Slovaka Paradizo /**CS/**, Internacia E-kursejo en **PISANICA /BG/** kaj Internacia Foiro de E-Turismo /**PL/**.

Ĉiu konkursinto estos konsiderata kiel aktivulo de **MONDA TURISMO** kaj regule ricevos Turisman Kalendaron kaj ĉiujn eldonaĵojn de **MT**.

Estraro de **MONDA TURISMO**

52-A INTERNACIA KONGRESO DE BLINDAJ ESPERANTISTOJ

La kongreso okazos en **PISATIRRENIA /Italujo/** de la 21-a ĝis 30-a de junio 1984. Korespondaĵojn brajlajn sendu al: Daniela **BOTTEGONI**, via Rismondo 1, I - 60123 **ANCONA /Italujo/** kaj nigreskribajn al **Michaela LIPARI**, via Tivaroni 5, I - 00143 **ROMA /Italujo/**.

Jen provizora programo:

- 1/ Kongrestemo: **LA BLINDA VIVRINO EN LA NUNTEMPA SOCIO**.

- Enkonduko de d-rino V. de FILIPPO. Seminario.
- 2/ Ĝenerala kunveno de L I B E /du kunsidoj/.
- 3/ D-ro R. KERVIN, prezidanto de UIC /Itala Blindul - Unuigo/: LA NEVIDANTOJ EN HODIAŬA ITALUJO.
- KIUJ PARTOPRENIS NE BEDAŬRAS, ĈAR SKITAGOJ ESTIS PLENAJ DE ĤONA SPORTO, AMUZO, INTERESAJ KAJ VALORAJ PRELEGOJ. NU KAJ VESPERE REGIS AMATORA DISKOTEKO, ĈU VI INTENCAS ESTONTE ANKAŬ PARTOPRENI ? ANONCU, DO, JAM NUN ĈE NI !!

- vaŝm -



JUBILEOJ DE LA ĈEĤA ESPERANTO-MOVADO:

- 1904 Komenco de la Esperanto-kursoj por blinduloj en Prago /Instituto de Klár - 80 j./
- 1909 La unua ĉeĥa Esperanto-kongreso en Prago /75 j./
- 1914 Inauguro de la unua memorskulpturo de Esperanto en la mondo /Františkovy Lázně - 70 j./
- 1949 Alvoko de la ĉeĥa ministro por informado Václav Kopecký por kunlaboro de la Klerigaj Konsilantaroj kun la Esperanto-movado /35 j./
- 27.01.1884 Julie ŠUPICHOVÁ, pionirino kaj pedagogino, honora membrino de ŬEA /100 j. de la naskigo/
- 31.01.1849 Božena ŠTUDNIČKOVÁ, pionirino, prezidantino de unua ĉeĥa virina E-organizo, poetino /135 j. de la naskigo/
- 02.03.1884 Hynek Karel BOUSKA, kunfondinto de la Klubo en Prago, red. de "Boĥema Esperantisto" /100 j. de la naskigo/
- 16.04.1904 prof. Josef KOŽENÝ, ĉeĥa verkisto kaj Esperantogramatikisto /80 j. de la naskigo/
- 16.05.1884 Eduard KUHNL, ĉeĥa Esperanto-pioniro /100 j. de la naskigo/
- 17.06.1909 Karel HOGER, ĉeĥa aktoro, nacia artisto, kunlaboranto de la "Verda Stacio" /75 j. de la naskigo/
- 19.08.1904 František OMELKA, sukcesa originala verkisto /80 j. de la naskigo/
- 26.09.1894 Theodor KILLIAN, elstara ĉeĥa verkisto kaj pedagogo, aŭtoro de la lernolibroj / 90 j. de la naskigo/

- 09.10.1899 Ľudovít IZÁK, elstara slovaka esperantisto, publi-
cisto kaj instruisto /85 j. de la naskigo/
26.10.1964 Rudolf HROMADA, ĉeĥa vortaristo kaj redaktoro
/20 j. de la forpaso/
12.11.1864 Stanislav SCHULHOF, ĉeĥa Esperanto-poeto /120 j.
de la naskigo/
01.12.1904 Josef VONDROUŠEK, ĉeĥa Esperanto-verkisto kaj
tradukisto /80 j. de la naskigo/

MAGNETOFONA PRUNTOSERVO

Daŭrigo

- 9/ La liston de la temoj kun indiko de la mg-speco /bobeno, kazedo/ kaj tieslongoj eldonas Komisiono de ĈEA por pre-
so kaj informado; la novaj titoloj estos de temp'al tem-
po publikigataj pere de STARTO kaj "Informoj". Sur karto
de ĉiu bendo la gvidanto registras movon de la elpruntoj
/la mendintojn, la datojn de la pruntoj kaj resendoj/.
Pri la nombro de la elpruntoj li sendas al la komision-
estro de temp'al tempo la raportojn.
- 10/ Lokaj grupoj aŭ unuopaj membrojde ĈEA mem povas plilarg-
igi kaj kompletigi la fonotekon de ĈEA kontraŭ repago de
efektivaj kaj registritaj elspezoj.

Josef Filip, Jaroslav Klement,
gvidanto de la mg-pruntoservo komisionestro

FUNDAMENTA FONOTEKO DE ĈEA

Registra N-o:	Temo:	Longo:
1	Nuna stato de rilatoj inter UEA UNESCO kaj E-movado /Corsetti, 1981/	60 min. /30+30 min./
2	Kontraŭfaŝista batalo de bulgaraĵ esperantistoj /Vojanov, 1981/	30+1 min.
	Latinidaj elementoj en planlingvoj /V. Barandovská/	28 min.
3	Sovetaj spertoj pri propagando pere de literaturo /Samodaj, 1981/	30+15 min.
4	Rilatoj inter nacio, lingvo kaj kulturo /Jermář, 1980/	60 min.
5	Esperanto-lingvo en la mond-lite- raturu /Jaki, 1967/	25 min.
	Andrzej Tomecki kantas	15 min.
6	Internacia lingva situacio kaj eblecoj de la raciigoj /Bokarev, 1967/	60 min.
7	Konfronta komparo de Esperanto al la etnolingvoj /D. Blanke/	60 min.

8	Historio de Centro de Esploro kaj Dokumentado /Lapenna, 1973/	30+25 min.
9	A. Seghert: La ekskurso de la mortintaj knabinoj /monologo de Eva Seemanová, 1978/	30+25 min.
10	Tefnikaj vortoj en Esperanto /Fritsch, 1978/	25 min.
	ISAE - apliko de Esperanto nuntempe kaj perspektivo /Kavka, 1978/	5+30 min.
	Jadwiga Gibczyńska: "Madame Marie Curie" /monologo de J. Gibczyńska/	30+15 min.

Atentigo: La numeroj 2 kaj 5 enhavas du; n-ro 10 enhavas tri titolojn. Mendu senescepte ĉe: Josef Filip, Nádraží 146, CS-768 11 Chropyně. Skribe mendu ĉiam numeron kaj titolon.

B I B L I O G R A F I A S E R V O D E E S P E R A N T O

STARTO startas novan servon por la legantaro. Kvankam la bibliografia listo ne povas anstataŭigi legadon de Esperantaj gazetoj kaj ĵurnaloj, oni eble iam kontentiĝos kun la kopioj de bezonata artikolo. Tiam turniĝu al estro de la servo: PhDr Petr CHALOUPKA, Stínadla 1064, CS - 584 01 LEDEČ NAD SÁZAVOU, Ĉeĥoslovakio.

La aŭtoroj publikantaj en la Esperantaj presajoj havas eblecon aboni individuan bibliografian liston, same se temos pri ili.

Kompleteco de la listo ne garantita, ĉar tute dependas je kompleteco de ricevataj jarkolektoj kaj krome, oni kompilados nur selekte pro mankoloko.

La servo estas SENPAGA, nur kopikostoj /Kĉs 3.-- aŭ 1 IRKP por du paĝoj/ kaj sendkostaĵoj estas demandotaj.

1-a serio: ESPERANTOLOGIO:

- 0001 ALARIKO: PLEDO POR CI. Brita Esp., 78, 1983, /1/, p.210.
Kritiko de maluzo. Rekomendoj uzi pronomon kiel singularan formon de la dua persona nomo.
- 0002 AULD, W.: PRI LA NATURO DE ESPERANTO. El Pop.Ĉin., 1983, 8, p.9-11, 9, p.6-8.
- 0003 BORČIĆ, L.: PAROLU ESPERANTON ESPERANTECE. Voĉo, 10, 1983, 4, p. 16-17. Komenci kaj fini estas transitivaj verboj, skribi ne estas senpersona verbo.
- 0004 FENYVESI, E.: MALFERMITA LETERO PRI PROZA TRADUKADO. Hung. vivo, 23, 1983, 2, p.75. Metodikaj rimarkoj pri tradukado; konkretaj postuloj por tradukistoj.
- 0005 GOLDEN, B.: LA HISTORIO DE LA PRONOMO CI EN ESPERANTO. Brita Esp., 79, 1983, /2/, p. 233-234.
- 0006 GOLDEN, B.: LA MISUZO DE "SERVI". Voĉo, 10, 1983, 3, p.14, 1 bd.

- 0007 GOLDEN, B.: LIGITA VORTORDO: LA EKZEMPLE DE "ANKAŬ". Heroldo de Esp., 59, 1983, 4, p.8. La vortordo en Esperanto estas libera nur inter difineblaj limoj. Ĉiu devio devas esti pravigebla.
- 0008 GOLDEN, B.: LINGVA LABORATORIO. Hung.vivo, 23, 1983, 4, p. 154 - 155. Analizo de la lingva nivelo en HV.
- 0009 GOLDEN, B.: LINGVAJ KONSILLOJ - "RESPEKTIVE". Voĉo, 10, 1983, 4, p.16.
- 0010 GOLDEN, B.: ONI NE UZU "KOMPUTILO", "KOMPUTORO" AŬ "KOMPUTERO", SED "KOMPO". Esperanto /IEF/, 61, 1983, 9, p.14.
- 0011 GOLDEN, B.: PREFERI OL AŬ PREFERI AL. Esperanto, 76, 1983, 10, p. 167.
- 0012 ĤESAPĈIEV, S.: LA BULGARAJ PROPRAJ NOMOJ EN ESPERANTO. Bulgara Esp., 52, 1983, 1, p. 10-11.
- 0013 LUDAMAN, T.T.: IDIOTISMO ... /?/. Hung.Fervoj.Mondo, 26, 1983, 3, p.48. Difino, ekzemploj je la bestnomoj.
- 0014 MAMDUHI, A.R.: FAKA ESPERANTO KAJ FACILA ESPERANTO. Heroldo de Esp., 59, 1983, 4, p.3. La pontlingvo bezonas ankau pontgazetaron por ligi komencantojn al la verkoj de la majstroj.
- 0015 MIĤAJLOV, L.: RADIO KAJ VORTO EN ESPERANTO. Bulg.Esp., 52, 1983, 5, p. 16 - 17.
- 0016 POPOV, M.T.: LA SUFIKSO POR ACIDOJ. El Pop.Ĉin., 1983, 6, p. 18.
- 0017 SASIADEK, S.: ANTONIMOJ EN ESPERANTO /projekto de vortaro/. Pola Esp., /75/, 1983, 2, p. 21-24.
- 0018 SEKELJ, A.: PRI LA PARTICIPOJ. Voĉo, 10, 1983, 1 - 2, p.12.
- 0019 VAITILAVIĈIUS, A.: ORTOGRAFIO DE PROPRAJ NOMOJ. Horizonto Sov.Litovio, 1983, 6, p. 23 - 29. Daurigo.Komenco en la 5-a kajero. Daurigota.



Por ĉiuj 25 vortoj vi pagas 15 Kčs au 5 irpk. Abonantoj el eksterlando turnigu al viaj perantoj pri detalaj informoj!

Katja MITZENHEIM, 12 - jara knabino, Justus-Jonas-Str. 19, 6120 EISFELD, GDR, volas koretutmonde kaj certe respondos.

Kiu volas korespondi k u n 13-jara japana knabino, skribu al: Miloš ŠTASTNÝ, 675 57 ROUCHOVANY 196, Ĉeĥoslovakio.

Jarmila GURNÍKOVÁ, 37-jara, Dobrá 2, 739 52 DOBRATICE 29, dez.kor.pri muziko, filmoj, televido k.libroj. Interes. gramofondiskojn, PM.

Uwe HEIDRICH, 39-jara ekonomisto, Augustenstr.8, 4500 - DESSAU, GDR dez.kor. pri ĝen.tem., kol. BK, PM.

Marina SIBIRCEVA, 8 - jara,
ul.Sverdlova 11, kv.25, 630093
NOVOSIBIRSK - 93, Sovetunio,
dez.kor.Esperante aŭ ruse kun
samaĝul/in/oj, kol.PM, EK.

Gábor MEDVEGZKI, 18-jara ju-
mulo, Ibolya u.9, 4027 - DEB-
RECEN, Hungario, dez.kor. kaj
kol. PM, EK.

Jelena SIMKOVA, 24 - jara
studentino de instituto de
fremdaj lingvoj, pr.Lenina 19,
kv. 39, 665708 BRATSK - 8, So-
vetunio, dez.kor.Esperante, an-
gle, hispane pri trikado, keed-
rado, libroj, ĵurnaloj precipe
anglaj k. amerikaj.

Lernejanaj, 11 - 15 jaraj,
dez.kor.kun ĉeĥoslovakaj sam-
aĝuloj Esperante k. ruse.Skri-
bu al: Skola /Lernejo/n-ro 61,
KID /Esperanto/, 2 Krasnojars-
kaja 82, ROSTOV-DON-91, Sovet-
unio.

Ing. Jiří PASTOR, Ĉapkova
ul.737, 738 Ol FRÝDEK - MÍSTEK,
Ĉeĥoslovakio, aĉetos jenajn
librojn: BOHATEC: Skryté po-
klady, MRÁZOVÁ: Josef Váchal a
knihy, FRIEDEL: Kodex gigas.

Samarkanda Esperanto - klubo
organizas ekspozicion UZBEKIS-
TANO TRA LA OKULOJ DE EKSTER-
LANDANOJ, dediĉitan al 60-ja-
rigo de Uzbeka Soveta Sociali-
sma Respubliko kaj Komunista
Partio de Uzbekistano.

Tiucele estas kolektataj el-
donitaj eksterlande ĈIULINGVAJ
tiutemaj libroj, revuoj, tag-
ĵurnaloj, prospektoj, fotoj,
plakatoj, pentraĵoj, versoj,
kantoj kaj ĉiuj ceteraj mate-
rialoj pri Uzbekistano. Estas
atendataj ankaŭ leteroj kun
voĵagimpresoj pri Uzbekistano
publikotaj en nia nacilingva
gazetaro.

Bonvolu sendi ĉion plejeble
baldaŭ al: INTERKLUBO ESPERAN-
TO, SU-703 000 S A M A R K A N-
D O, GLAVPOĈTAMT, ABON. JA.76,
UZBEKISTANO, SOVETUNIO.

Prof. Humphrey TONKIN infor-
mis nin, ke li eksigis el sia
posteno en la Universitato de
Pensilvanio por fariĝi Prezi-
danto /Rektoro/ de la Ŝtata U-
niversitata Kolegio en POTSDAM
en la Ŝtato Novjorko. Ekde la
1-a de julio 1983 lia adreso
fariĝis:
Office of the President
State University College
POTSDAM, NY 13676
Usono.

Kelkdekoj da gebulgaroj
15 - 68-jaraj serĉas E-geami-
kojn tutmonde: Esperanto-klubo
p.k.61, 5180 POLSKI TRAMBEŠ,
Bulgario.

Klubo de geesperantistoj ĉe
Komunuma kulturcentro POLSKO,
672 40 KOTLA, Pollando,dez.kor.
k.ĉ.l.

E-klubo de sindikata kul-
turdomo deziras kontakti kun
similaj eksterlandaj E-klubo-
j por interŝanĝo de spertoj.Skri-
bu al: SKOA St. Stamenov, dom-
na kulturata, Klub na esperan-
tista METALURGO, BG-9700 Š U-
M E N, Bulgario.

M. NEZNALOVÁ, Gorazdova 3,
120 00 PRAGO 2, Ĉeĥoslovakio,
dez.kor.kaj inters.EK tutmonde
kun pli maljun.gesamideanoj.

Libuša RAPĈANOVÁ, 22-jara,
VIDIMÁ, ul. Športová 30,984 01
LUČENEC, Ĉeĥoslovakio,int. pri
muziko, filmoj, geografio,poe-
moj kaj volas inters.EK,gramo-
fondiskojn, suvenirojn.

Marek TOMUSZCZYK, woj. Koniń, 62 741 GRZYMIŃSZEW, Pol-
lando dez.kor.kun geknaboj.

Alexander LYCZLA, Bp. Kaš-
zásduľ u. 3, VIII/74, BUDA-
PEŠTO, 1031 - Hungario, dez.kor.
kun geknaboj.

Ludmila SMOLOVÁ, Roosewelto-
va 251/III, 503 51 CHELUMEC NAD
CIDLINOÚ, Ĉeĥoslovakio, 33-ja-

ra, dez.kor., inters.BK, gra-
mofondiskojn, suvenirojn kaj
int.pri fremdaj lingvoj, muzi-
ko, historio kaj filmoj.

Nova E-klubo PROSPERO en
urbo GORKIJ dez.interš. rusajn
diskojn k. kasetojn je Espe-
rantaĵ. Skribu al: A.L. ĈIBA-
NOV, ul.Svobody 126, BOL.MURAŠ-
KINO /Gorkovsk.obl./, SU-60633Q
Sovet-Unio. La propono validas
ĉiam.

XII. roĉnik JARNĤO MĤROVEĤO POCĤODU

v Jablonci n. Nisou odstartuje dne 21.dubna 1984. Mŭžete se při-
hlásit na trasy : 15 km, 25 km, 35 km, vŝe v okolí mĝsta.

Start je od výstaviŝtě v Jablonci v 8,00 hod. Prezence a přiĥ -
hláŝky na adrese KaSS, Jiráskova ul., Jablonec. Poĉetnějši sku-
piny nechť připraví jmenný seznam podle zvolených tras.

Startovné : 5,-- Kĝs, děti 2,-- Kĝs. Popis tras obrzší ŭĉastníci
u prezence.

Zvláŝtní ceny jsme připravili podle tradice pro nejpoĉetnějši ko-
lektiv a pro nejmladŝi, nejstarŝi a nejvzdálenĝjši ŭĉastníky z
ĈSSR i ze zahraniĉií. Prátelŝtý večer pro vŝechny zájemce 21.4 v
19,30 hod v klubovně Balkán v KaSS Jablonec.

Ubytování je třeba ihned objednat, cena asi 70,-Kĝs/1 osoba.
Piŝtě na adresu KLUB ESPERANTISTŭ, poŝt.přiĥ. 190, 466 21 Jablo-
nec n. Nisou.

Resumo: při la Pacmarŝo en Jablonec, kiu okazos 21.4.1984. Starto
en 8,00 h. de foirejo Jablonec/ str. Jiráskova/. Kiu volas, ve-
nu inter ni, telegrafe aliĝu al adreso ESPERANTO, Pf.190, Jablonec

STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská strato 10,
110 00 PRAGO 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6 foje jare. Responda re-
daktoro Zdenko KRĤMSKŭ. Grafika aranĝo Milan LABAŠTA. Desegna-
ĵoj Pavel RAK. Transdonita al presejo la 10-an de februaro
1984. Jarabono Kĝs 24,--, por eksterlando Kĝs 36,-- aŭ 10,50
gld, inkluzive sendkostojn. Abonantoj turniĝu al niaj perantoj,
al UEA aŭ rektvoje al nia asocio.

STARTO - nepravidelný vĝstník Ĉeského esperantského svazu, Jil-
ská ul. 10, 110 00 PRAHA 1, vydávaný pro potřebu členŭ svazu.
Vychází 6x ročně. Odpovědný redaktor Zdenko KRĤMSKŭ. Grafická
úprava Milan LABAŠTA. Kresby Pavel RAK. Tisk zajiŝtuje Tech-
nické ŭstředí knihoven, Praha. Předáno do tisku dne 10. února
1984. Roční předplatné Kĝs 24,--, pro zahraniĉií Kĝs 36,-- nebo
10,50 guldenŭ, včetně poŝtovních výloh. Dohlédací poŝta Pra-
ha 07. Snížený poplatek za poŝtovně povolen Ĥeditelstvem poŝt
Praha pod ĉ. jedn. P/1 - 1267 ze dne 6. dubna 1979.

KOVOVÉ METALAJ REMIZOJ GARÁŽE

el ŝtala lado - fundamenta farbot-avolo - duparta pordego - deklina tegmento - sen planko - facila montado au sur submuro au sur ebena tereno

Longo 4400 mm - prezo 4840,-Kčs
Longo 5300 mm - prezo 5350,-Kčs
Longo 6200 mm - prezo 5830,-Kčs
Largo 3030 mm alto 2450 mm estas egalaj ĉe ĉiuj tri tipoj.

Je mendo fabrikas kaj dum malonga tempo 1-2 semajnoj liveras

INKLEMO

PRAHA (kooperativo)

Skribajn mendojn sendu al la adreso de komerca fako: INKLEMO PRAHA, maloobchodní úsek, 190 00 PRAHA 9, Spojovací 11, a telefonu al n-ro 83 09 49. Persono mendeblaj en Pragaj vendejoj de la kooperativo. Transporton ni povas certigi. Remizojn ni liveras nur al privatuloj.

Český esperantský svaz
110 01 PRAHA 1, Jilská 10

Noviny

DOHLÉDACÍ POŠTA PRAHA 07,
SNÍŽENÝ POŠTOVNÍ POPLATEK
POVOLEN ŘEDITELSTVÍM POŠT PRAHA
J.ZN.P/1 - 1267/79 ZE DNE 6.4.1979